

1978 septembro

71-a jaro

n-ro 873 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Grandioza UK en Varno

Vi trovos

ke la 63a Universala Kongreso en Varno forkonsumis en la sekvaj paĝoj nian tutan provizon de la plej flataj epitetoj. Vi ja scias, ke ĉi tiu revuo iom pesas siajn vortojn kaj do ne uzas komplimentojn facilanime. Sekve, la ĉi-numeraj vortoj, kiel ekz. "grandioza", "triumfo", "impona", "giganta", "inspira" ktp., havas sian profundan kialon kaj ni pretas verve defendi ilian uzon ĉi-foje. La Kongreso ne estis brile organizita kaj plendemuloj — al kiuj aliĝas ankaŭ ni per la paĝo 168 — facile trovis kaŭzojn por riproĉoj. Tamen, ŝajnas, ke en Varno neniun malkontentis. Oni eble sukcesis kompreni, ke organizi perfekte kongreson por kvin mil homoj estas simple ekster la kapabloj de iu ajn landa Esperanto-movado, de iu ajn — eĉ plej renoma — turisma aŭ vojaĝa agentejo. Kvin mil kongresanoj definitive estas organize ne manipulebla homamaso. Ni devus pensi pri tio survoje al niaj estontaj Kongresoj. Nia tuta kongresorganiza stilo devus iom modernigi. Tio permesus, ke niaj kongresaj rikoltoj estu pli abundaj, kiel diras d-ro Tonkin fine de sia malferma parolado (v. la paĝon 159). Ni timas, ke pro la tradiciemo en niaj kongresorganizaj laboroj multa matura greno restis nerikoltita sur la kampoj de Bulgario ĉi-jare. Sed, kiel vi konstatos sur la sekvaj paĝoj, eĉ tio kion ni rikoltis ĉi-foje en Varno sufiĉas por abunde nutri nian entuziasmon dum pluraj jaroj antaŭ ni. Fine, en Varno ne premis varmo vetera. Estis bele por la korpo kaj animo. Salut'!

Enhavo

- 149 63a Universala Kongreso de Esperanto: Varno estis triumfo
- 150 Solena Inaŭguro de la 63a Universala Kongreso de Esperanto: Inaŭguro por plena inspiro
Salutvortoj de s-ro Peter Tanĉev: Noblaj streboj
- 151 Mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al la 63a UK: Vi pioniras novajn vojojn (Amadou Mahtar M' Bow)
- 153 Malferma solenaĵo de la 63a UK: Kiel uzi sian "minuton"?
- 155 Parolado de d-ro Humphrey Tonkin en la Solena Malfermo de la 63a Universala Kongreso: Ni estu senpaciencaj!
- 160 Komitataj kaj estraraj kunsidoj: 40 landaj asocioj en UEA
- 161 Ĝeneralaj kunsidoj: Ĉu utila inventaro?
Rezolucio de la 63a Universala Kongreso de Esperanto
- 162 Esperantologia Konferenco: Granda intereso pri esperantologio (Viktor Aroloviĉ)
Internacia Somera Universitato: Novaj prelegantoj
- 163 Arta programo: Movada arta metropolo
Belartaj Konkursoj de UEA 1978: Rezultoj
- 164 Teatra programo: BET meritas teatran ejon (P. Rados)
- 165 Kelklinie pri... (mallongaj notoj pri aliaj kongresaj programeroj)
- 166 34a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Amase kaj sukcese (Jim Cushing)
- 167 TEJO-Komitato en Veliko Tarnovo: Pli da aktiveco
- 168 Kongreseroj...

La kovrilo

Se la kovrilo jam konsistas el dek kvin fotoj, leganto povas imagi, ke la redakcio faris iom pli ol kutimajn penojn, ke la numero jam fruntpage iel simbole prezentu la ĉefan trajton de la Kongreso. Ni parolas pri grandiozo en la kovrila titolo. Tion volas diri ankaŭ la ĉefbildo de la kovrilo. Se ĝi iom malelokventas, tio ŝuldiĝas nur al la neprofesieco de nia fotografo, kiu konfuzite gapi al la tuta impono kaj grandeco de la inaŭgura sceno. La sep vizaĝojn maldekstre de la centra foto kaj la sep dekstre de ĝi, ni ne intencas identigi al vi. Ili ĉiuj estis kongresanoj. Rigardu, eble inter la 3014 vizaĝoj sur la kovrilo troviĝas ankaŭ tiu de vi mem?!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro:

33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.




63a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, VARNO 1978 07 29 – 08 05:

Varno estis triumfo

”GRANDIOZA internacia manifestacio de la Esperanto-movado”, diris Yukiko Isobe, tiu kongresa simbolo de la japana esperantistaro. Baldur Ragnarsson, ĉeforganizanto de la pasintjara UK, versis en la komenco:

Kuniĝu sentoj kaj raci’ / en forta mikso harmonia / en ĉi Kongreso multfolia / sur nutra ter’ de Bulgari’... Plenumiĝis la poeta profetaĵo! Sufiĉis por ”sentoj kaj raci’”! Lasante antaŭ si nur la 15an UK en 1923, la 63a UK, kun 4 413 aliĝintoj (kaj kelkcento da pliuloj) el 51 landoj, estas la plej amasa movada manifestacio en la lastaj 55 jaroj. Kun efektivaj partoprenantoj el

ĉiuj kontinentoj, kun 130 sovetianoj, 70 japanoj, pli ol cent finnoj, 40 rumanoj, 20 sudamerikanoj, duonmilo da poloj, plurdeko da nordamerikanoj, kelkcento da ĉeĥoj kaj slovakoj, aŭstralianoj, madagaskaranoj, kun delegacioj el Ĉinio kaj Vjetnamio, Varno estas la plej universala el la Universalaj Kongresoj. Varno estas plurrilata kaj plurobla triumfo: triumfo de la tuta Movado, de UEA, de Humphrey Tonkin, kies prezidanta staturo donis unikan stampon al la Kongreso, de Nikola Aleksiev, tiu sagaca organiza majstro. Varno estas ankaŭ respondo, lumturo, inspiro, invito, sprono. . .





SOLENA INAŬGURO DE LA 63a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO:

Inaŭguro por plena inspiro

KUN KVIN MIL kongresanoj kaj gastoj, en la mal-abunde sed trafe ornamita salonego de la Palaco de Kulturo kaj Sporto en la bulgara somera metropolo Varno, la Solena Inaŭguro de la 63a UK estis verŝajne la plej impona sceno en la tuta historio de la Movado. La amaseco de la vidaĵo trudis pensojn pri iu estonta tempo, kiam ni ne plu kongresos, kiam la Internacia Lingvo fariĝos propraĵo de la homaro. Eĉ sen aliaj eroj de la escepte riĉa kongresa semajno, nur tiu inaŭgura dimanĉa antaŭtagmezo en Varno sufiĉas por plena inspiro, por forigo de ĉiuj duboj, por abunda nutro de la movada persistemo.

Eĉ la lastaj sidlokoj en la plafonen alsupranta spektejo estas okupitaj. Diplomatoj kaj aliaj honoraj gastoj venas de speciala akcepto kaj okupas la unuajn seĝovicojn. La prezida podio ankoraŭ malplenas. La granda kongresa flago super la podio dum momento ĉefrolas spertante la plej grandan nombron da rigardoj en sia jardekojn longa vivo. Dekstre de la podio leviĝas la manoj de ĥorestro kaj potence eksonas la Himno. La aŭditorio stariĝas kaj iom hezite kunkantas. Spontana aplaŭdo antaŭ residiĝo. De maldekstre eniras, laŭvice: Gorov, Grattapaglia, Pettyn, Bormann, Støp-Bowitz, Waringhien, Zahariev (reprezentanto de la Ĝenerala

**SALUTVORTOJ DE S-RO PETER TANĈEV,
ALTA PROTEKTANTO DE LA 63a UK:**

Noblaj streboj

Mi ĝojas, ĉar mi havas la honoron en la nomo de la Ŝtata Konsilantaro kaj de la Registaro, en la nomo de la bulgara popolo kaj en mia nomo elkore saluti vin okaze de la inaŭguro de la 63a Universala Kongreso de Esperanto. Mi estas feliĉa prezenti al vi varmajn kaj plej korajn salutojn de la ŝtatestro de Popola Respubliko Bulgario Todor Ĵivkov — granda amiko de la esperantistoj el la tuta mondo, kiu alte taksas la Internacian Lingvon Esperanto kiel lingvon de paco kaj amikeco inter la popoloj.

Mi volas esprimi mian grandan kontenton pro la fakto, ke dum la lastaj 15 jaroj la duan fojon vi, reprezentantoj de Eŭropo, Azio, Latin-Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio, kunvenas en nia lando por trakti la problemojn kaj la taskojn de la internacia Esperanto-movado. Ni alte

taksas vian rekonon pri la agado de la bulgaraj esperantistoj, kiel altan honoron por Bulgario, kiu aprezas kaj subtenas la aferon de la esperantistoj. Mi esperas, ke ankaŭ ĉi-foje, en nia nigramara belulino Varna, vi havos la eblecon konvinkiĝi pri la tradicia kaj varma bulgara gastamo.

Dum tiuj varmaj tagoj, tie ĉi, en Varna, sur la bordo de Nigra Maro, en tiu ĉi Palaco de Sporto kaj Kulturo, en kiu ofte regis la bonfara spirito de pluraj emociigaj forumoj, vi manifestos vian strebon, sendepende de rasa, nacia, religia kaj politika aparteno, komuniĝi sen interpretantoj, havi kaj vastigi viajn ĉiufankajn kontaktojn kun ĉiuj homoj, vivi en paco kaj en reciproka interkompreniĝo kaj amikeco de ĉiuj popoloj.

La ĉefa temo de via Kongreso, ĉerpita el la rekomendoj de Unesko pri edukado en spirito de internacia kunlaboro, estas tre aktuala. El tiu temo vi prenis nur unu punkton: "Internacia lingvo — internacia edukado", ĉar tio estas la kerna esenco de la Esperanto-movado. Mi estas profunde konvinkita, ke la traktado de tiu temo surbaze de la internacia Esperanto-movado, donos al via Kongreso pli grandan nuntempan nuancon kaj

Direktoro de Unesko), Sadler, Aleksiev, Jonov (urbestro de Varno), Peevski, Szabó-Felső, Maertens kaj sidigas ĉe la prezida tablo sur la podio, lasante du lokojn en la mezo vaki. Akompanataj de aplaŭdego eniras la Alta Protektanto s-ro Peter Tanĉev kaj la prezidanto de UEA kaj okupas la du lokojn meze. D-ro Tonkin leviĝas: "Karaj gekolegoj! Bonvenon al la 63a Universala Kongreso de Esperanto!". En mallonga, bela parolado d-ro Tonkin mencias la variecon de la Kongresoj (Ateno, Tokio, Madrido, Rejkjaviko) kaj atentigas pri la amaseco de la ĉi-jara UK. Li dediĉas omaĝajn vortojn al tri datrevenoj: 100 jaroj de post la liberiĝo de Bulgario, 70 jaroj de la ekzisto de UEA kaj 30 jaroj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. "Tri datrevenoj: por Bulgario, por la parolantoj de Esperanto, por la tuta homaro... En tiu festa atmosfero, kaj antaŭ unu el la plej amasaj manifestiĝoj de la potenco de Esperanto en ĝia tuta historio, en la nomo de vi ĉiuj, mi malfermas la 63an Universalan Kongreson de Esperanto."

S-ro Nikola Aleksiev, prezidanto de la LKK, direktas al la kongresanoj vortojn de bonvenigo. Ili sonas tute malkliŝe, sincere. Li pardonpetas pri organizaj malglatiĝoj, konfesas embarasiĝon, kiun al la organizantoj portis la neplanita milo da kongresanoj, konfesas la maldormon de la LKK kaj promesas solvon de la lastaj loĝigaj problemoj. D-ro Tonkin faras sian kontribuon al la necesa intimiĝo de la solenaĵo, li diras: "Kutime, en la formalaj inaŭguroj, oni rigardas al la homoj, kiuj sidas sur la podio, kaj interŝanĝas flustrojn pri kiu estas kiu. Por malhelpi la duminaŭguran flustradon, mi prezentos al vi la homojn sur la podio." Laste li prezentas la Altan Protektanton. S-ro Peter Tanĉev, unua

(Vidu daŭrigon sur p. 152)

MESAĜO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO AL LA 63A UK:

Vi pioniras novajn vojojn

Ne povante alparoli vian Kongreson, kiel mi faris la pasintan jaron en Rejkjaviko, mi deziras direkti al vi, en mia propra nomo kaj ankaŭ en la nomo de la Organizo, kiun mi estras, mian plej koran saluton.

Unesko ekkonos la konkludojn de viaj debatoj kun des pli da interesiĝo, ke la kongrestemo, dediĉita precipe al la internacia edukado, tuŝas plurajn demandojn, kiuj estas ankaŭ inter ĝiaj propraj zorgoj: edukado al la plenaĝuloj, plibonigo de la instruprogramoj por la Tria Mondo, Rekomendo de la Ĝenerala Konferenco de Unesko pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

Tiel vi pretiĝas por apliki en la eduka kampo tiun serĉadon de unu **komuna lingvo** — en propra kaj figura sencoj —, kiu estas la ekzistokialo mem de Universala Esperanto-Asocio. Kun plej laŭdinda persistemo vi faris vin la pioniroj de internacia kunlaboro, kiu malfermas novajn vojojn al dialogo inter la popoloj kaj inter la kulturoj. Miaj plej varmkoraj kuraĝigoj akompanas vin ĉe tiu ĉi nobla tasko kaj mi formulas la deziron, ke vian laboradon kronu la plena sukceso, kiun ĝi meritas.

Amadou Mahtar M'Bow



S-ro Tanĉev dum la oficiala akcepto por 500 kongresanoj

celkonformecon. Tio estu via kontribuo al la solvo de la tuthomara tasko dum la 63a UK de Esperanto, kongreso, kiu eniras la Esperantan historion kiel unu el la plej amasaj kaj imponaj kongresoj.

Tre nature, via Movado havos la plej bonajn kondiĉojn pri realigo de novaj sukcesoj tiam, kiam la homaro ekvivos en paco kaj sekureco, kiam ĝi forigos por ĉiam la

militon kiel rimedon por solvo de internaciaj konfliktoj; kiam ĝi povos multigi la riĉaĵojn de la kulturo, kreitajn dum jarcentoj. Nur tiam, movado kiel la via, povos trovi ankaŭ pli grandan moralan kaj materian apogon en nacia kaj internacia skalo

La bulgara socio rilatas tre simpatie al la noblaj streboj de la esperantistoj, ĉar en ilia personeco ĝi vidas sincerajn agantojn por reciproka interkompreniĝo en la mondo, por fruktodona kunlaboro inter la ŝtatoj, sendepende de ilia socia ordo Por realigi tiujn celojn necesas ne nur la klopodoj de sobre pensantaj ŝtatistoj, sed ankaŭ la larĝa subteno de la publika opinio, kiu estiĝas ĉiam pli kaj pli potenca faktoro

Mi kredas, ke via restado inter ni, en nia lando, donos al vi plenan ideon pri nia laborema kaj liberama popolo, pri nia multjarcenta kulturo, pri nia nuntempa socia sistemo kaj grandaj atingoj en ĉiuj sferoj de la vivo. Paralele kun tio, mi esperas, ke el Bulgario vi forportos memoron pri unu renaskiĝinta lando, pri popolo — konstruanto, kiu varme deziras kaj batalas por sia feliĉa vivo en paco, kunlaboro kaj interkompreniĝo kun la popoloj de la tuta planedo.



vicprezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de Bulgario, alparolas la Kongreson (v. parton de lia parolado sur p. 150-151).

Post muzika intermezo, la Kongreson salutas la urbestro de Varno, s-ro Stanoj Jonov. S-ro Zaharij Zahariev, reprezentanto de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, prezentas al la kongresanoj salutmesaĝon de s-ro Amadou Mahtar M'Bow (v. la tekston sur p. 151). Antaŭ nova muzika paŭzo, s-ro A. Pettyn, estrarano de UEA pri edukado, enkondukas la kongresan ĉeftemon "Internacia lingvo — Internacia edukado".

La tradicia kongresa revuo de diplomatoj ne estis longdaŭra en Varno (kiu havas nur kelkajn konsulejojn). Tamen, ĝi estis ne malpli impona ol en pluraj antaŭaj Kongresoj. Unue d-ro Dietrich Bukowski, ambasadoro de Aŭstrio, surprizas per sia saluto en perfekta Esperanto, nome de la Federacia Kanceliero Bruno Kreisky. El Ĉeĥoslovakio ĉeestas s-ino Vanková (Ministerio de Kulturo) kaj salutas d-ro Anton Kamenický, ĝenerala konsulo. Post multaj jaroj, parolas reprezentanto de Ĉina Popola Respubliko, s-ro Baj Ŝoŭmian, politika konsilisto. S-ino Kirsten Madsen, aferŝarĝito, transdonas bondezirojn de la registaro de Danlando. Ĉeestas s-ro Heinz Hanisch, ĝenerala konsulo de Germana Demokratia Respubliko, s-ro László Virág, kultura ataŝeo de Hungario, kaj s-ro Zen Phun Rjol, kultura ataŝeo de Korea Demokrata Respubliko. Kapitano R. Bugge-Paulsen salutas nome de la registaro de Norvegio. Nome de Pollando parolas s-ro Marek Źbik, ĝenerala konsulo. S-ro Raŝed Kelani, ambasadoro de Sirio alparolas la Kongreson nome de sia registaro. Ĉeestas s-ro Vladimir Kijaŝko, unua sekretario de la Ambasadado de Soveta Unio. Lastaj diplomataj salutoj venas el Svislando pere de s-ro Leo Renggli, ambasada sekretario kaj konsulo. Sian ĉeeston anoncis sed ne sukcesis realigi ankaŭ la kultura konsilanto de Irako, ambasadoro de Pakistano kaj aferŝarĝito de Peruo.

"Finante la nunan kunsidon, mi tamen deziras emfazi, precipe por niaj gastoj, la celojn de nia agado kaj la vojon laŭ kiu ni direktas nian energion.

La kunveno ĉi-matene ne similas aliajn internaciajn kunvenojn. Ĝi okazas sen la interveno de tradukistoj kaj interpretistoj. Ĝi okazas en spirito de plej profunda harmonio. Kvankam neniu saĝa parolanto de Esperanto asertus, ke la nura utiligo de Esperanto kreas harmonion, ekzistas nenia dubo, ke la diverseco de la lingvoj en la internacia sfero grave malhelpas la internacian kunlaboron. Neniu saĝa parolanto de Esperanto asertus ankaŭ, ke la nura ekuzo de unu lingvo por internacia agado aŭtomate metus nutraĵon en la stomakojn de tiuj kiuj malsatas, aŭtomate resanigus tiujn kiuj suferas pro plej teruraj malsanoj, aŭtomate alfabetigus tiujn kiuj ne scias legi aŭ skribi. Sed la utiligo de unu sola lingvo por la internaciaj kontaktoj inter la homoj ebligus, finfine, fronti rekte kaj senŝancele tiujn demandojn. La lingva problemo, laŭ unu senco, ne estas samnivela problemo, kiel la problemo de malsato aŭ malsano aŭ analfabeteco aŭ la demando pri milito kaj paco. Sed la solvo de la lingva problemo estas unu el la antaŭkondiĉoj de la solvoj de tiuj aliaj urĝaj problemoj de la homaro. Kaj kiel solvi la internacian lingvan problemon? Ĉu per utiligo de unu sola nacia lingvo en la internacia sfero? Iri tiun vojon signifus redukti al duaklaseco ĉiujn kiuj ne denaske regas tiun lingvon. Ĝi estus rekta lingvo diskriminacio, same koroda al la animo kaj materia stato de la homoj, kiel rasismo aŭ seksismo. . . . Antaŭ vi, karaj gastoj, troviĝas la fenomeno de Esperanto, racia alternativo al la lukto de la lingvoj. Nia Asocio staras preta helpi pri la enkonduko de Esperanto en la internacian agadon. Ni forigu unu fojon por ĉiam la barilon de la lingvoj en la internacia socio. Tio estas, karaj gastoj, nia celo."

Per tiuj vortoj de d-ro Tonkin finiĝas la plej spektakla inaŭguro en la historio de la Universalaj Kongresoj.

Kiel uzi sian "minuton"?

POSTTAGMEZE, dimanĉon, la 30an de julio, je la 4a horo, en la granda kongresa halo denove svarmas. Orkestro el la bulgara urbo Targoviŝte preludas. Prof. Carl Stöp-Bowitz, vicprezidanto de UEA, bonvenigas ĉ. kvar mil kongresanojn kaj, aparte, la alian vicprezidanton de UEA, William Auld, kiu pro trafikaj malhelpoj ne sukcesis ĉeesti la Inaŭguron matene, sed nun okupas sian lokon ĉe la prezida tablo. Kun iom tro da verdo kaj emfazita disciplino anstataŭ spontaneco, la salonon traparadas plurdeko da geknaboj kaj salutas nome de la 16a Internacia Infana Kongreseto. Akademiano Kiril Bratanov, nome de sciencistoj, eldiras inspirajn vortojn, kiujn vi trovas alialoke en ĉi tiu numero.

Komenciĝas tiu bela, temporaba sed nerezignebla revuo de la salutoj de landaj asocioj. La ĉefan mikrofonon stafete transprenas, laŭvice: J. Scolnik (Argentino), A.J. Cocking (Aŭstralio), E. Majtanić (Aŭstrio), M. Tholet (Belgio), N.A. Krieger (Brazilo), J.A. Duckworth (Britio), G. Dolapčiev (Bulgario), J. Vítek (Ĉeĥoslovakio), E. Kehlet (Danlando), P. Lohikoski (Finnlando), M.-T. Liouville (Francio), R. Hahlbohm (Germana DR), E. Bormann (FR Germanio), G. Miggas (Greklando), M.R. Urueña de H. (Hispanio), I. Kutás (Hungario), K. Fettes (Irlando), B. Ragnarsson (Islando, kun speciale verkita rondelo), N. Israeli (Israelo), M. Lipari (Italio), Y. Isobe (Japanio), B. Miličević (Jugoslavio), L. OhUiginn (Kanado), B. Moon (Luksemburgo), E. Kervers (Nederlando), O. Prytz (Norvegio), F.E. Wood (Nov-

CHANG CHI CHENG:

Kun amikaj sentoj la ĉina delegacio alvenis ĉi tien por ĉeesti la 63an UK. Ni transdonas al vi geesperantistoj el diversaj landoj, al la popolo de la gastiganta lando Bulgario kaj al la fervoraj gesamideanoj de LKK korajn salutojn de Ĉina Esperanto-Ligo kaj la ĉina esperantistaro. Ni esperas, ke tiu ĉi kongreso plifirmigos la amikecon inter la esperantistoj kaj donos bonan ŝancon por interŝanĝi spertojn en lernado kaj disvastigado de nia lingvo. Ni ĉinaj esperantistoj volas plifortigi niajn rilatojn kun diverslandaj samlingvanoj en disvastigo kaj utiligo de la lingvo Esperanto, kaj ni klopodos por fari niajn kontribuojn tiurilate.

Zelando, kun mesaĝo de la ĉefministro), A. Pettyn (Pollando), M. Andréasson (Svedio), D. Bertolini (Svislando), M. Walker (Usono). Sekvas aparte interesa bukedo de salutoj el la landoj, kies Esperanto-organizaĵoj ankoraŭ ne aliĝis al UEA: G. Sevak (Armenio), Chang Chi Cheng (Popola Respubliko Ĉinio), M. Rakotondravao (Madagaskaro), A. Linares (Peruo), A. da Silva Almeida (Portugalia), I.F. Bociort (Rumanio), B. Kameškov (Soveta Unio), J.E. Bachrich (Venezuelo), Nguyen Duc Quy (Vjetnamio). El la landoj sen organizita Movado salutis J. Minani (Burundio) kaj T. Megalli (Egiptio). Salutojn de la 46a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, kiu okazis samtempe kun la UK, transdonis T. Ŝošov; A. Menabene peris la salutojn de la itala parlamenta E-grupo; nome de IFEF salutis F. Pher-sy. Inter la salutleteroj kaj telegramoj estis ankaŭ tiuj de M. Sancho-Izquierdo (membro de Honora Patrona Komitato de UEA), V. Setälä (Honora Membro), Ĉilia Esperanto-Asocio, Kuba Esperanto-Asocio, Esperanto-kluboj el Moskvo, ukrainaj verkistoj, esperantistoj el



Bildo, kiun oni longe memoros kun fiero: La malfermaj solenaĵoj de la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varno.

Tasmanio, Internacia E-Muzeo en Vieno kaj de multaj aliaj unuopuloj kaj grupoj el la tuta mondo.

Post muzika paŭzo, d-ro Tonkin faris sian longan paroladon, kiu, laŭ lia enkonduka rimarko, devis esti multe pli raporteca ol ĝi fine fariĝis (vidu sur la sekvaj paĝoj iom koncizigitan tekston de tiu parolado). La prezidanto havis antaŭ si skribajn notojn por tiu parolado, kiujn li poste transdonis al ni, kun rimarko, ke ni atentu la sonbendon, ne la notojn. Montriĝis, ke la ĉeestantaj miloj da esperantistoj, el kiuj plimulto ne estas ĉiujaraj kongresanoj, estis tiel inspira aŭditorio, ke jen kreiĝis parolado eble ne tro kohera, sed plurloke kerna kaj esenca por ĉiu celtrafa movada aktiveco en la nuna tempo. Prof. Støp-Bowitz proponas, ke la kongresa salonego nomiĝu "Hodler", omaĝe al la 70a datreveno de UEA kaj ties fondinto. La kongresanoj aklame akceptas. Simbole, la longa malferma solenaĵo finiĝas per zamenhofa *La vojo*, kiun laŭ muziko de J. Kolev premiere prezentas kantista trio kaj blovorkestro de Targoviște. Pro la subtaksita longeco de la Malfermo, ĉiuj aliaj programeroj en la resto de la tago prokrastiĝis je plena

KIRIL BRATANOV:

La Monda Federacio de Sciencistoj estas organizaĵo, kiu unuigas 450 000 scienculojn el 57 landoj de la mondo. Ĝi strebas al tio, ke la scienco, tiu ĉi potenca forto, servu al la bezonoj de la homoj; ĝi strebas al paco kaj amikeco inter la popoloj. Ni sciencistoj ĝoje konstatas, ke ankaŭ via esperantista movado strebas al paco kaj amikeco inter la popoloj... Nia agado estas simila al la via, ni havas komunajn celojn kaj taskojn.

Antaŭ vi, reprezentantoj de la internacia Esperanto-movado, mi deziras ĝoje substreki, ke la organo de la Monda Federacio de Sciencistoj, *Scienca mondo*, jam duan jaron aperas ankaŭ en Esperanto. Ĝoje mi konstatas, ke pri la Esperanta eldono de *Scienca mondo* regas granda intereso en ĉiuj partoj de la mondo.

Mi deziras transdoni al vi salutojn ankaŭ de bulgaraj sciencistoj. Ĉe nia Asocio de Bulgaraj Sciencistoj ekzistas speciala Esperanto-sekcio, kiu praktikas tre bonan agadon. La granda franca sciencisto Frederiko Joliot-Curie diris, ke por la scienco ne ekzistas ŝtatlimoj, por ĝi ne estas necesaj pasportoj. Ni ankaŭ opinias, ke la internacia lingvo Esperanto povas disporti la fruktojn kaj sukcesojn de la scienco tra la tuta mondo, sen vizoj kaj pasportoj...

Fine, dezirante al vi sukceson en via nobla agado, mi volas menciigi interparolon kun sciencisto, profesoro, kiun mi atentigis pri Esperanto. Li diris, ke esperantistoj estas fanatike ligitaj al sia lingvo, ke ili estas fanatikuloj. Mi respondis: Jes, ili estas fanatikuloj, sed tio estas nobla fanatikeco, kora fanatikeco, fanatikeco kiun la mondo bezonas. Tial, karaj amikoj, mi deziras, ke vi pluportu en viaj koroj tiun noblan fanatikecon, tiun fajron, tiun amon al la lingvo, kiu estas krea kaj riĉa perilo de paco kaj amikeco inter la popoloj.

IGNAT F. BOCIORT:

En nia epoko eĉ la plej grandaj ideoj ne venkas sen sciencaj argumentoj, sen konvinkforto de la praktiko, sen batalanta patoso. "Mi asertas" devas signifi "Mi kredas, mi sentas, amas, pretas je sinofero", diris la rumana historiisto Nicolae Jorga. Esperantistoj batalu ne nur pasie, sed ĉiam science, do prestiĝplene. Precipe post kaj per interveno de sciencistoj estiĝis en Rumanio Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko en la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Oni enkondukis Esperanton kiel pedagogian studobjekton en filologiajn fakultatojn, oni eldonis esperantlingve la jubilean numeron de *Ferioj en Rumanio*. Tri unikaĵoj en la enlanda Movado. Ni enkonduku Esperanton en la sciencon. Ni enkonduku la sciencon en la tutan E-agadon. Iuj ne kredas en la historia destino de la Internacia Lingvo. Iam oni ne fidis la kulturan estontecon de la nunaj kulturlingvoj. Oni ne fidis la rumanan ĝis Gherghe Lazăr, la germanan ĝis Lessing, la rusan ĝis Lomonosov, la francan ĝis Ronsard, la italan ĝis Dante, la latinan ĝis Kato la Olda. Historio kaj mitologio estis severaj kun la agantoj por novaj ideoj. La homo ofte falis, sed finfine li surpaŝis la lunon. Venkis tiuj kiuj kredis je necesa kaj nevenkebla justeco. Ĉiam labori kaj batali, neniam malesperi, uzi la konkretajn kondiĉojn, estas alta kaj malnova revolucia saĝeco. Esperantujo signifas bildon aŭdacan, kuraĝon sciencan kaj civitanan. Ĉi tie ne estas loko por pesimismoj kaj kapitulacantoj. Jen agadprincipoj de la kolektivo Esperanto-Interlingvistiko de la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj de Rumanio, agadprincipoj de ĉiuj rumana esperantistoj, en kies nomo mi salutas vin elkore kaj respektplene, dezirante samtempe sukcesan kongreson.



horo. Oni eble denove pensos kion estonte fari kun la salutoj de la landaj asocioj, ĉar ili ja forprenas duonon de la disponebla tempo. Nu, oni pensu, sed oni ne venu al ideo forigi el la programo tiun unike inspiran signon de la movada tutmondeco. Eblas reĝisore redesegni tiun programeron. Eblas ankaŭ delegi por tiu reprezenta tasko homojn, kiuj tiel bele eluzos sian "minuton", kiel tion ĉi-jare faris la ĉina, rumana (v. enkadrigitajn tekstojn) kaj kelkaj aliaj landaj salutantoj.



PAROLADO DE D-RO HUMPREY TONKIN
EN LA SOLENA MALFERMO DE LA 63a UNIVERSALA KONGRESO:

Ni estu senpaciencaj!

(La teksto aperas laŭ la sonbendo; estas faritaj nur sensignifaj mallongigoj).

LA PENSADO de la parolantoj de Esperanto ekiras de unu fundamenta tezo — ke la lingva problemo estas unu el la ĉefaj problemoj, kiuj bremsas la progreson de la homaro kaj malhelpas ĝian kunvivadon. El tiu premiso sekvas la tuta agado por la Internacia Lingvo. Ĝi havas du aspektojn. Unue, la diverseco de la lingvoj malhelpas la internacian kunlaboron. Tiu diverseco estas parte rezulto de la simpla nekapablo de la homoj lerni sufiĉajn lingvojn por interkompreniĝi adekvate kaj parte la rezulto de kultura kaj politika fenomeno — la rifuzo de potencaj ŝtatoj submetiĝi al la lingva reĝimo de aliaj ŝtatoj. Tiu lingva diverseco havas grave malhelpajn rezultojn. Laŭ raporto de Unuiĝintaj Nacioj, kiu aperis en 1977, pli ol cent milionoj da dolaroj estas elspezataj ĉiujare de la instancoj de UN por kovri la rektajn elspezojn de la lingvaj servoj. Tio ne inkluzivas malrektajn elspezojn: oficejojn, presadon ktp. Statistiko de la Eŭropa Komunumaro montras eĉ pli konsternan situacion: pli ol unu kvarono de la tuta oficistaro de la Komunumaro laboras en la lingvaj servoj. En diversaj mondpartoj oni luktas kontraŭ grandaj lingvaj problemoj interne de ŝtatoj, oni investas grandegajn sumojn en la instruado de fremdaj lingvoj, oni laboras intense por atingi pli fortan internacian pozicion pri la propra lingvo. Tiom pri la lingva diverseco.

La dua aspekto de la lingva problemo ne estas la lingva diverseco, sed la perforta lingva unueco. La proporcio de la buĝeto de la japana registaro, ekzemple, uzata por fremdlingva instruado estas certe multe pli granda ol tiu de la brita aŭ usona registaro. Kaj kial tio estas? Ĉar la angla lingvo ludas multe pli grandan internacian rolon ol la japana. Kiam teknika helpo venas al evoluantaj landoj de Azio aŭ Afriko, ĝi venas per difinita lingvo. Kutime ĝi venas efektive per eŭropa lingvo, per la angla aŭ la franca aŭ la germana aŭ la rusa. Kiam diplomato el Venezuelo parolas en Unuiĝintaj Nacioj, li parolas la denaskan hispanan lingvon. Kiam diplomato el Brazilo parolas en UN, li parolas ne la denaskan, sed alian lingvon. Vi vidas do, ke en ĉiuj tiuj sferoj regas perforta lingva unueco. La homoj devas utiligi la saman lingvon, sed tre ofte tio ne estas la lingvo denaska, sed iu alia lingvo. Do la lingva problemo havas tiujn du aspektojn: diverseco unuflanke kaj perforta unueco aliflanke.

Malgraŭ la grandegaj elspezoj, malgraŭ la ofte neadekvataj rezultoj, malgraŭ la fakto, ke milionoj da homoj kaj miliardoj da dolaroj estas ĉiujare uzataj por kontraŭbatali la lingvan diversecon; malgraŭ la diskriminacio kaj dominado — la lingva problemo ofte ne troviĝas ĉe la supro de la tagordo de plej multaj niaj gvidantoj, kiam temas pri internaciaj problemoj. Multaj homoj konsideras lingvan diversecon tiel natura kaj neŝanĝebla, ke ne indas okupiĝi pri ĝi. Homoj eĉ entuziasme submetiĝas al la jugo de lingva dominado. Kvankam la tempo laboras por ni, en la senco, ke pli da homoj fariĝas konsciaj pri la politika rolo de la lingvo kaj la danĝeroj de lingva subpremiĝo, tamen pri lingvaj demandoj la homaro ĝenerale restas ankoraŭ iom needukita, ankoraŭ ne plene komprenata. Sekve, la tasko antaŭ ni estas granda. Ĝi estas nenio alia ol eduki la mondon pri lingvaj demandoj kaj montri al ĝi la solvon almenaŭ al multaj tiaj demandoj — nome Esperanton.

Lastatempe, tra la tuta mondo, ekestis multe pli firma konscio pri la digno de la homo. Kvankam tiu konscio



estas longa, preskaŭ tiel longa kiel, finfine, la homa historio mem, tamen dum la pasintaj tridek jaroj, proksimume, la tuta demando, ekzemple, pri diskriminacio fariĝas aktuala. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, subskribita antaŭ tridek jaroj, klare emfazas la neceson apliki la homajn rajtojn sen diskriminacio pri raso, sekso, lingvo, religio, kaj dum la tridek jaroj de la ekzisto de la Deklaracio, tio fariĝis ĝenerale akceptita principo, eĉ se ĝi ne estas adekvate aplikata.

Oni vidas efektive en la nuna tempo laboron kontraŭ la rasismo. Oni vidas laboron por forigi seksan diskriminacion. Sed la organizoj, kiuj plenumas la laboron kontraŭ rasismo, tiuj organizoj, kiuj laboras por forigi seksan diskriminacion, efektive aplikas lingvan diskriminacion en la propra laboro. Do la lingva demando estas ankoraŭ neplene komprenata de la homoj. Sekve, ni kiel esperantistoj, kiel parolantoj de Esperanto, devas

en nia Kongreso. Per tiu islanda kongreso kaj nia alia agado, ni daŭre emfazas al Unesko, ke oni ne povas trakti la problemojn, ekzemple, de artefaritaj satelitoj aŭ de la fluo de informado aŭ de la gazetaro sen konsidero de la ecoj de la homoj mem — nome, ke ili parolas lingvojn, ke tiuj lingvoj estas diversaj kaj ke informoj disvastigataj en nekonata lingvo ne estas informoj, sed bruo kaj nenio alia ol nura bruo.



ne nur konvinki la homojn pri Esperanto, sed eĉ antaŭ tio — por tiel diri, kiel antaŭkondiĉo de tio — ni devas konvinki la homojn pri la realeco de lingva diskriminacio, pri la realeco de la utiligo de la lingvo kiel perfortilo ĉe la homo. Do ni havas duoblan taskon.

Al tio mi aldonu la fakton, ke, se oni rigardas la ĝeneralan internacian situacion, oni vidas la bezonon de ponto inter la lingva diverseco unuflanke kaj la neceson de lingva unueco aliflanke. La diversaj popoloj de la mondo havas multon por kontribui al la ĝenerala sumo de la homa kulturo. Estas necese, ke ĉiuj diversaj nacioj, ĉiuj diversaj popoloj havu la eblecon esprimiĝi, havu la eblecon ankaŭ esprimi tiujn valorojn al la mondo kiel tuto. Do, la problemo estas, kiel konservi tiujn kulturajn valorojn, ĉar ili estas apartaj kaj valoraj, kaj samtempe komuniki ilin al la ekstera mondo.

Bezonata estas neŭtrala lingva ponto, kiu ebligas al difinita nacio aŭ popolo ŝirmi la propran kulturon kontraŭ la atencoj de aliaj kulturoj kaj samtempe esprimiĝi, samtempe transdoni siajn kulturajn valorojn al la cetero de la mondo. Tio kondukas, tiu vojo do kondukas aŭtomate al Esperanto. Esperanto estas la ponto inter la lingva diverseco kaj la lingva unueco. Ĝi konservas lingvan diversecon tie, kie ĝi estas valora, kaj ĝi kreas lingvan unuecon tie, kie ĝi estas bezonata.

Tiom pri ĝeneralaj principoj. Ni transiru al la situacio de UEA mem. UEA laboras por intensigi la konscion pri lingvaj problemoj kaj ĝin kombini kun la konscio pri diskriminacio kaj kultura diverseco. Pro tio ni kunlaboras kun Unesko en esplorado de la problemoj de la komunikado. La pasintan jaron markis tre signifaj sukcesoj en tiu rilato. Nia Asocio, kiel vi scias, gastigis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko en la 62a Universala Kongreso, kies ĉeftemo estis "la rajto je komunikado". Ĉi-jare la Ĝenerala Direktoro estas denove reprezentata

Estas mirige kiel multe niaj internaciaj diplomatoj, politikistoj, gvidantoj ktp. okupiĝas pri teknikaj problemoj de komunikado, okupiĝas pri satelitoj, sed forgesas, ke finfine estas homoj, kiuj kreas tiujn satelitojn, estas homoj, kiuj utiligas tiujn satelitojn kaj estas homa komunikado, kiun ili peras kaj, se entute ne ekzistas lingva unueco, oni povas ĵeti mil satelitojn en la aeron kaj tio havos nenian efikon. Finfine, oni ne donu al homoj lavmaŝinojn por lavi la vestojn, se tiuj homoj ne havas vestojn. Oni ne donu al homoj artefaritajn satelitojn, se ili ne havas lingvon por utiligi per tiuj satelitoj.

Dum la pasinta jaro, UEA partoprenis plurajn konferencojn kaj renkontiĝojn sub aŭspicio de Unesko pri tiu ĉi temo. Pro la interveno de UEA, la rajto je komunikado nun troviĝas en ĉefa loko en la tagordo de la konferenco de neregistaraj organizoj en konsultaj rilatoj kun Unesko kaj okazos pri tiu temo simpozio en la domo de Unesko post kelkaj monatoj. Lastatempe ankaŭ UEA partoprenis renkontiĝon de specialistoj de Unesko pri rasismo, kun aparta atento al lingvaj aspektoj de rasismo.

Vi vidas do, ke ni estas rekte engaĝitaj en la laboro de Unesko kaj mi krome aldonu, ke ni proksime rilatas ankaŭ al Unuiĝintaj Nacioj. Nuntempe niaj funkciuloj, niaj postenuloj — por tiel diri — ĉe UN ellaboras projekton de propono, kiun ni esperas transdoni al la koncerna fako de UN, pri eksperimenta utiligo de Esperanto kiel lingvo de dokumentado. Tiu propono ne havas formon de granda rezolucio, kiu postmorgaŭ komplete ŝanĝos la lingvan situacion en UN. (Mi opinias, ke la lingva situacio de UN ne estas ŝanĝebla en du tagoj). Temas efektive pri eksperimento limigita per kiu ni klopodos montri, ke utiligo de Esperanto en la dokumentado liberigus sufiĉajn rimedojn por ebligi plifortigon de la aliaj elspezoj de la lingvaj servoj aŭ por ebligi plifortigon de la programoj de UN ĝenerale. Tio

estas malfacila tasko. Ĝi bezonas sisteman sciencan analizon. Sed mi esperas, ke ĝi finfine alportos sukceson.

Ĝenerale, en niaj rilatoj kun UN kaj kun Unesko, mi devas diri, ke ni malofte renkontas antaŭjuĝojn, ke ni ofte renkontas multan subtenon kaj ke efektive estas pli da pordoj malfermaj al ni, ol ni povas trapasi. Ni ne parolu tro multe pri antaŭjuĝoj ĉe internaciaj organizoj. Ne estas ĉiam antaŭjuĝo, kio igas homon ne vidi aferojn, kiuj al aliaj homoj estas evidentaj. Tre ofte temas pri tio, ke oni devas konvinki homojn. Nia laboro estas ne ĉiam spektakla, sed tamen gravega, kaj tio estas konvinki la homojn, sisteme kaj per ĉiuj niaj fortoj.


La tuta ekstera laboro de UEA ne havas sencon, se ĝi ne baziĝas sur firma fundamento en la Esperanto-movado mem. Efektive, la kresko en la eksteraj rilatoj, kiu estas rimarkebla en la lasta periodo, estas rekta konsekvenco de plifortiĝo de la Esperanto-movado en si mem kaj plifortiĝo ankaŭ de UEA.

Necesas unuavice kompreni, ke ni partoprenas ĉi tie unikan lingvan fenomenon. Kvankam Zamenhof kreis nur la bazon de nia lingvo, kiu kreskas kaj floras sesdek jarojn post lia forpaso, tamen ne ekzistas alia lingvo en la mondo kun tia historio, ne ekzistas aliaj kongresoj kiel la nuna, ne ekzistas internacia kulturo komparebla al la Esperanto-kulturo. Feliĉe, oni rimarkas kreskantan intereson flanke de sciencistoj kaj precipe lingvistoj kaj sociologoj pri tiu fenomeno mem. Unu el la plej kuraĝigaj evoluoj de la lastaj jaroj estas ĝuste la kresko de scienca interesiĝo pri Esperanto. Tio ne necese okazas flanke de esperantistoj mem en plej malvasta senco, sed flanke de objektivaj sciencistoj, kiuj trovas en Esperanto unikan lingvan fenomenon, kiu bezonas esplo-

aktiveco vere intensiĝas, sed, kompreneble, ankoraŭ ekzistas grandaj mankoj en la Esperanto-libraro — ne tiom sur la literatura kampo kiom sur la kampo de popularscienco kaj sociaj sciencoj. Ekzistas granda bezono, ĝuste ekster Eŭropo en la nuna periodo, por bonaj fundamentaj verkoj pri la diversaj sciencoj.

Mi mencias la agadon ekster Eŭropo. La landa agado ĝenerale tra la mondo pliintensiĝas. Nia revuo raportis lastatempe pri eksterordinara kresko de la Esperanto-movado en Irano; inter viaj kongresaj dokumentoj multaj el vi trovis indikon pri la pli firma stato de la Movado en Rumanio — luksan turisman revuon en Esperanto, kiu estas unikaĵo por ili; el Soveta Unio venas bonaj novaĵoj pri plifirmiĝo de la Movado tie; estas novaj signoj pri agado en Pakistano kaj Hinda Unio; venas novaĵoj pri pli da Esperanta agado en Ĉinio, kaj ni vidas la pruvon ĉi tie; ĵus finiĝis la Unua Latin-Amerika Kongreso de Esperanto, en Marília, Brazilo, kiu kunvenigis kvincenton da kongresanoj el 12 landoj de Latina Ameriko. Staras antaŭ la Komitato momente aliĝpetoj, pretaj, de kvar landaj asocioj, kaj aliaj staras jam en la kulisoj kaj verŝajne baldaŭ aldoniĝos.

Ni vidas efektive ege interesan historian fenomenon. La Movado en la tradiciaj landoj, t.e. tradiciaj kiam temas pri subteno al UEA, kiel ekzemple Britujo aŭ Francujo aŭ FR Germanujo aŭ Italujo, la Movado en tiuj landoj restas relative stabila. Sed la ekvilibro iom aliĝas, ĉar ekster Eŭropo la agado por Esperanto tiel intensiĝas, ke la lingvo efektive fariĝas vere tutmonda. Ne nur surpapere tutmonda, sed vere monda Movado. Tio ne estas ĉiam evidenta por homoj kiuj loĝas en Eŭropo, ĝuste ĉar ili troviĝas en tiu stabila ankoraŭa centro de la Esperanto-movado.



ron. Tiuj homoj per sia objektiveco helpas al ni, ĉar la sciencistoj estas la homoj al kiuj la politikistoj sin turnas, kiam ili bezonas solvojn de demandoj. Se ni ne konvinkos la sciencistojn, estas vane konvinki la politikistojn. Fakte, ni devas labori sur ambaŭ kampoj samtempe.

Sed jam mi transpaŝas al la kerno de la afero: la vivanta Esperanto-movado mem. Dum la periodo 1977/78 la bilanco estas klara: pozitivaj atingoj multe superas la malsukcesojn aŭ stagnojn. La jaro 1977, ekzemple, estis escepte bona jaro por la Esperanto-libro; la eldona

UEA sekvas tiun evoluon de proksime. Do, ekzemple, ni lastatempe decidis sendi nian revuon aere ankaŭ al ĉiuj homoj ekster Eŭropo kaj tio multe helpas. Tio signifas, ke kiam en eŭropa poŝtkesto troviĝas la revuo, samtempe ĝi troviĝas ankaŭ en la japana aŭ aŭstralia aŭ nov-zelanda aŭ afrika. Kaj tio do havas la signifon, ke nia UEA, la Esperanto-movado ĝenerale, ne plu estas iu eŭropa monopolo.

Oni vidas do signifajn ŝanĝojn, kiuj okazas ĉirkaŭ ni en la Esperanto-movado en la nuna tempo. UEA faras sian eblon ekspluati tiun novan situacion. Nia administracio

plifirmiĝas. Lastatempe, ekzemple, malfermiĝis en Antverpeno en Belgujo Grafika Centro de UEA, kiu nun prizorgas plejparte la grafikajn laborojn, kiuj estis antaŭe farataj en Roterdamo. Ni ne efektive translokiĝis la Centran Oficejon al Belgujo, kio estis ja iu punkto sur nia eventuala tagordo, sed ni jam iasence malfermas filion en Belgujo, tiel ke ni nun laboras en du landoj.

Samtempe en la Centra Oficejo ni havas grandan helpon de la Volontula Servo de UEA. Efektive, sen la Volontula Servo ni vere ne povus plu daŭrigi nian laboron efike. Tiu servo estis fondita en 1975 kaj ĝi jam portis al ni grandajn ŝparojn en la financa flanko kaj ankaŭ grandajn helpojn en la administra flanko de nia laboro. Tamen la laboro de la Centra Oficejo estas giganta. Kaj mi opinias, ke multaj niaj membroj ne komprenas tion. Ekzemple, pensu, se nur unu leteron ĉiujare skribus al la Centra Oficejo ĉiu membro de UEA, tio estas 120 leteroj tage, dum la labortagoj (malgraŭ tio, ke niaj oficistoj emas labori ankaŭ sabate kaj dimanĉe). Ni havas la ekvivalenton de ok plentempaj oficistoj en la CO, kio signifas, ke ili devas respondi al proksimume 15 leteroj ĉiutage, ĉiu persono. Tio ne lasas multan tempon por aliaj aferoj.

Feliĉe, ni sukcesas elturniĝi. Ni faras nian laboron kaj ni faras ĝin relative efike. Vi devas kompreni, ke gvidi tiel grandan Movadon kia estas la Esperanto-movado estas malfacila tasko por niaj profesiaj laborantoj. Kaj imagu, se ĉiu esperantisto, se ĉiu membro de UEA, ŝanĝus sian loĝlokon nur unu fojon en ĉiu sesa jaro, tio signifas, ke estus mil adresŝanĝoj de individuaj membroj ĉiujare, kiujn oni devas registri kaj aranĝi. Tio estas laborego kaj oni ofte ne pensas pri tio. Feliĉe tamen, ni havas en nia Oficejo grupon da vere sindonaj homoj, kiuj laboras sub la gvido de d-ro Sadler, kaj ni ankaŭ havas ĉirkaŭ la Centra Oficejo grupon da same sindonaj homoj, kiuj amatore laboras por Esperanto. En tiu rilato mi ne povas ne menci iujn miajn kolegojn en la Estraro. Tiu Estraro estas, mia opinio, tre efika Estraro, kiu bone kaj harmonie kunlaboras kaj, laŭ mia observo almenaŭ, kiu faras ĉion kion ĝi povas fari por krei harmonian etoson en la Movado kaj por antaŭenigi nian aferon konscie kaj efike. Aldone al la Estraro, la Komitato laboras, laŭ mia opinio, same bone kaj celkonscie. Sed preter tiu Estraro kaj tiu Komitato troviĝas ne iu dismetita membraro de UEA, sed UEA mem, ĉar UEA, malgraŭ ĉiuj supozoj, ne estas la oficistoj de la CO, ne estas nia Estraro, ne estas nia Komitato. Ĝi estas vi. Ĝi estas ni. Ĝi estas ĉiuj homoj, kiuj laboras en la sino de nia Asocio.

Unuflanke, tio prezentas grandan defion: kiel kunordigi tiel grandan amason da homoj. Aliflanke, ĝi reprezentas nian plej grandan forton. Ni havas la kapablon, la grandan forton de amaso da homoj, kiuj estas konvinkitaj pri unu firma afero, nome pri Esperanto mem, kiuj utiligas ĝin, kiuj praktikas ĝin, kiuj per ĝiaj kulturaj valoroj riĉigas sin kaj kiuj samtempe riĉigas la Movadon per sia partopreno en tiu Movado.

Ni havas la potencon. Mi ne scias pri vi, sed almenaŭ mi estas senpacienca. Ni havis bonan jaron. Ni multon

atingis dum la pasinta jaro. UEA nun antaŭeniras, la Esperanto-movado antaŭeniras, eĉ pli rapide ol UEA iasence. Tamen, la laboro ne iras sufiĉe rapide. Mi sentas certan senpaciencon.

Kio estas entute tiu senpacienco? Kio malhelpas, ke Esperanto ne pli rapide progresas ol ĝi progresas nun? Unuavice, laŭ mi, la fakto, ke ni ne ĉiam laboras konsekvence. Oni ne povas konvinki saĝajn homojn per duonbakitaj argumentoj. Oni ne povas persvadi klerajn homojn per nura svingado de standardo. Se ni volas konvinki la eskterstarantojn, necesas evoluigi saĝajn argumentojn bone prezentitajn.

Ni vivas en ĉiam pli interdependa mondo. La homoj, kompreneble, ĉiam dependis unu de la alia en la fizika senco. Se mi malpurigas komunan akvosistemon, ni diru, mi venenas miajn fratojn. Sed nun aldoniĝas novaj, home kreitaj interdependoj: aviado, la internacia mon-sistemo, la fluo de krudaj materialoj kaj industriaj varoj. Kion plejparte la homoj ne komprenas en la Esperanto-movado estas tio, ke tiuj interdependoj geometrie intensiĝas de jaro al jaro. Kiom da komercaj aviadiloj flugis en 1928, kaj kiom flugas nun? Kiom da homoj vojaĝis tiam, kiom nun? Tiam multaj naciaj ekonomioj estis esence sendependaj, nun ĉiuj ekonomioj interligiĝas. Venis televido, komputiloj, laseroj, satelitoj, supersona flugado. Sed ni, parolantoj de Esperanto, ankoraŭ tro ofte uzas la argumentojn de 1928, ankoraŭ tro ofte uzas argumentojn de epoko, kiu jam pasis. Inter 1950 kaj 1970 la monda industria produktado triobliĝis, ekzemple. Tio signifas, ke la tuta interligiĝo de la homaro inter 1950 kaj 1970 fundamente ŝanĝiĝis. Tio siavice signifas, ke nia argumentado por Esperanto devas esti en konstanta stato de ŝanĝiĝo. Ni devas aktualigi niajn argumentojn, ni devas fronti la



nunan situacion, ni devas kompreni, ke eĉ dum ni atendas, ke oni venu al Esperanto, la internacia lingva situacio ŝanĝiĝas. Ĉar, komprenu, ne estas tiel, ke oni venos neeviteble al Esperanto. Ne estas tiel ke, se la esperantistoj sidas en sama loko, flirtigas siajn standardojn, kantas siajn kantojn, ne estas tiel, ke la cetera mondo finfine envenos la salonon kaj kunkantos. Ne.

Ili trovos siajn solvojn. Tio ne estos idealaj solvoj. Ili perfortos homojn, ili malhelpos aliajn homojn, ili entute kreos en la mondo situacion plene diskriminacian, sed ili solvos praktike siajn problemojn. Ni efektive frontas tiun situacion en kiu ni iros de lingva diverseco al lingva unueco, kaj tiu lingva unueco estas nete diskriminacia, nete malhelpa al la interkompreniĝo de la popoloj kaj nete perforta kaj malhelpa ankaŭ al Esperanto. Ni troviĝas inter tiuj du ekstremoj, inter diverseco kaj unueco, kaj ni devas nun fari nian vojon, laŭ tiu meza vojo, kaj konvinki la homojn per nia argumentado. Sidado ne sufiĉas. Agado necesas. Ni ne estas nur Esperanto-movado, ni estas plenumanto-movado. Tion ni devas memori.

Kompreneble, konsekvenca laboro ne estas facila. Entute la laboro por Esperanto ne estas facila. Facile niaj homoj seniluziiĝas, kulpigas unu la alian, interbatalas. Mi diru al vi tute sincere, ke en tro da landoj, en tro da landaj asocioj, kaj inter tro da landaj asocioj, ekzistas nuntempe diversaj fendoj, diversaj miskomprenoj, diversaj interbataloj. Kiom ofte oni aŭdas pri tiu aŭ alia landa asocio: "Bedaŭrinde, ke tiu landa asocio ne povas efike kunlabori, bedaŭrinde ke la tendaro de ikso kaj la tendaro de ipsilono ne povas efike kunlabori"? Memoru: Ni ne laboras por iu landa asocio, ni ne laboras por iu tendaro, ni ne laboras por ni, efektive. Mi esperas, ke mi ne laboras por vi, nek vi por mi. Ni laboras kune, ni laboras por idealo, kaj tiu idealo estas Esperanto. Kaj pro Esperanto ni devas absolute kunlabori. Ni devas kunigi niajn fortojn, ĉar Esperanto tion meritas. Ne estas tiel, ke ni meritas tion. Ne estas tiel, ke ni devas atendi la dankojn de niaj samideanoj. Ne, tio ne estas la celo. La celo estas labori por Esperanto kaj unuiĝi ĉirkaŭ la ideo de Esperanto.



Pro tio UEA estas neŭtrala organizo. Jam en 1908 kiam fondiĝis UEA, oni komprenis, ke por kunigi la homojn, por kunigi la agadon, necesas efektive baza neŭtrala fundamento ankaŭ politike. Nia Asocio havas membrojn en ĉiuj mondopartoj de plej diversaj sistemoj, plej diversaj registaroj, en plej diversaj cirkonstancoj. Kaj necesas entute konservi tiun neŭtralecon por ebligi la

antaŭeniron de la Movado. Mi tion insiste emfazas, ĉar ĝi estas nia, aŭ unu el niaj plej fundamentaj fortoj, tiu tutmondeco, internacieco, kiu ebligas al ni ekzemple ĉi tie kunveni, en spirito de harmonio, malgraŭ tio, ke ni venas el plej diversaj filozofiaj, politikaj, sociaj, kulturaj sistemoj. Ni konservu tiun neŭtralecon per ĉiuj niaj fortoj.

Kaj kion ni unuopuloj fine povas fari por atingi la sukceson de Esperanto? Kiel ligi nin al tiu ĉi nobla idealo? Unue, ĉiu el ni analizu la proprajn talentojn. Tiuj, kiuj estas bonaj instruantoj, instru la lingvon. (Cetere, kiam mi parolas pri bona instruanto, mi celas homon, kiu kapablas igi aliajn homojn lerni Esperanton, ĉar estas multaj bonaj instruantoj, kiuj instruas nenium, sed kiuj havas la impreson, ke ili estas bonaj instruantoj). Tiuj, kiuj kapablas verki, verku en la lingvo. Tiuj, kiuj havas sciencajn sciojn, utiligu tiujn sciencajn sciojn en la servo de la Movado. Tiuj, kiuj havas specialajn talentojn dediĉu tiujn talentojn al nia komuna agado. Ni havas ĉi tie en tiu ĉi ĉambro — simple en tiu ĉi ĉambro, por ne paroli pri la Esperanto-movado ĝenerale — amason da talentoj. Nia tasko estas kunigi tiujn talentojn efike. Se ni povas fari tion, ni povas konsistigi forton absolute nevenkeblan.

Dum aliaj internaciaj organizoj priŝraŭbas siajn kapablojn kaj klopodas iamaniere interkompreniĝi, ni ne havas tiun malfacilaĵon. Ni povas inter ni komuniki kaj, se ni povas tiel facile komuniki tra la tuta mondo, ni povas kunigi niajn fortojn, ni povas labori kune por tiu fina celo. Kaj tion ni devas nepre fari. Por fari tion necesas ankaŭ spirito de toleremo, ĉar ni ĉiuj laboras por la sama afero. Ne necesas ĵaluzo. Ne necesas, ke ni metu obstaklojn en la vojojn de aliaj, kiuj laboras por Esperanto. Ĉar, se ni ĉiuj laboras por la sama afero, tiam tolereme, sed samtempe inteligente, helpeme, sed samtempe ankaŭ iom kritike, ni povos kune labori por nia afero.

Memoru finfine, ke UEA ne estas iu oficejo. UEA, kiel mi diris pli frue, estas ni ĉiuj. Pensu, kion vi povas fari por UEA, kiel vi povas helpi al ni kaj al vi. Se vi havas ideojn, se vi havas sugestojn pri nia agado, kaj precipe, se vi estas pretaj helpi en tiu agado, turnu vin al ni. Se vi dediĉus ankoraŭ ni diru unu horon semajne, al Esperanto, se vi dediĉus tiun horon specife al laboro por UEA, UEA povus inter nun kaj la venonta jaro duobligi siajn fortojn. Do, se vi havas ideojn, skribu al ni. Ne atendu tuj respondon, ĉar la nombro de leteroj, kiujn ni ricevos ĉiutage, kreskos de 120 al eble 220, sed tamen ni volas aŭdi de vi kaj ni volas klopodi utiligi vian helpon en la laboro de la Asocio.

1977/78, kiel mi diris, estas laŭ kiu ajn mezuro, sukcesa jaro po. Esperanto. Sed ni estu senpaciencaj! Ni igu la jaron 1978/79 eĉ pli sukcesa kaj pli fruktodona kaj ni komencu tion per la nuna Kongreso. Kiel diris al mi s-ro Aleksiev antaŭ kelkaj tagoj, estas malnova bulgara proverbo, kiu diras, ke en unu tago oni rikoltas por tuta jaro. Ni havas sep tagojn en nia Kongreso. La rikolto por 1978/79 povus esti grandega.

Humphrey Tonkin

40 landaj asocioj en UEA

KOMITATO: Dum la kongresa semajno en Varno okazis entute sep kunsidoj de la Komitato de UEA. La demando de la kvorumo neniel aktualis, ĉar la Kongreson ĉeestis 51 komitatanoj, 12 anstataŭantoj kaj 3 observantoj (88% de la tuta Komitato). Kiel kutime, antaŭ la plej supera organo de la Asocio staris ampleksega tagordo, kiun oni ĉi-jare sukcesis sufiĉe elĉerpe trakribri, ĉefe dank' al la laboro de pli ol dek komitataj komisionoj, kiuj kunsidis tra la tuta semajno (kelkaj eĉ plurfoje), kaj dank' al la preparlaboroj, kiujn faris la Estraro antaŭ la Kongreso.

Agrabla kaj plej simple solvebla tagorda ero estis elekto de novaj Honoraj Membroj de UEA: Laŭ propono de la Estraro, la Komitato unuanime elektis s-ron Ŝihej Mijake (Japanio) Honora Membro de la Asocio. (Biografion de s-ro Mijake vi trovos en la oktobra numero de la revuo). Tamen, unuaranga novaĵo el la komitataj kunsidoj en Varno certe estas akcepto de kvin novaj aliĝintaj landaj asocioj en la sinon de UEA, tiel ke nun la aliĝintaj landaj organizaĵoj atingas la ŝajne rekordan nombron de 40. Aparte emfazinda fakto estas, ke kvar el la nov-aliĝintaj organizaĵoj estas ekstereŭropaj, kio bele spegulas la atenton, kiun UEA en la lastaj jaroj dediĉas al la tutmondigo de la Movado. La novaj aliĝintaj landaj asocioj de UEA estas: Meksika Esperanto-Federacio, Venezuela Esperanto-Asocio, Brazilia Esperanto-Ligo, Perua Esperanto-Asocio kaj Malta Esperanto-Societo. Iom da aparta atento elvokis la realiĝo de Brazilia Esperanto Ligo (BEL), ĉar ĝi estas la dua aliĝinta landa organizaĵo el Brazilo. Tiu situacio estis kreita jam en 1973, kiam la Komitato akceptis la aliĝon de Kultura Koooperativo de Esperantistoj, kion sekvis ekŝiĝo de BEL, kiu do nun simple revenas al UEA. En Varno, tamen, aŭdiĝis fortaj deziroj pri unuiĝo de la landa Movado en Brazilo. Aparta komitata komisiono, kiu traktis la aliĝpetojn de novaj landaj asocioj, ne trovis la dokumentaron pri la organizaĵoj en Ĉilio kaj Madagaskaro sufiĉa, por ke la aliĝpetoj estu fintraktitaj dum la ĉi-jaraj komitataj kunsidoj. Ĉiukaze, tiuj du landaj asocioj kandidatas por baldaŭa aliĝo al UEA.

La Estrara Raporto (v. la junian numeron de la revuo) provokis viglan diskuton. Aŭdiĝis opinioj, interalie, ke difinitaj ĉapitroj de la Raporto tro atentigas okazintaĵojn en la Okcidenta Eŭropo kaj pretervidas gravajn atingitaĵojn en aliaj landoj; la Raporto parolas multe pri planoj por la estonta agado, anstataŭ unuavice enfokusigi rezultojn de la koncerna laborperiodo. Malgraŭ tiuj kaj aliaj rimarkoj, la Estrara Raporto estis akceptita sen kontraŭaj voĉoj, kun nuraj kvar sindetenoj. La Estraro kaj la Komisiono pri Financo kaj Administrado ricevis en Varno nekutiman komplimenton de la Komitato: la financaj partoj de la Estrara Raporto (oni voĉdonis

aparte pri ili) gajnis senrezervan aprobon de la Komitato, kiu unuanime akceptis la Spezokonton 1977, la Bilancon je 1977 12 31 kaj la Spezokonton de la 62a UK en Rejkjaviko, kun aparta laŭdo al la pasintjara LKK. La buĝeto de UEA por 1979 renkontis en la voĉdono 5 sindetenoj, ĉar la Estraro antaŭvidas finance malfacilan jaron por la Asocio. Kvankam tiun Buĝeton enestas pluraj eroj, kiuj koncernas la tutan membraron (v. la paĝon 124 de nia junia numero), ni lasu ilian pli detalan prezenton por iu posta fojo, ĉar la praktiko de la lastaj jaroj estas tia, ke la Estraro pli-malpli senĉese gardostaras super la Buĝeto, kiu travivas tutan aron da revizioj kaj adaptoj.

Statutoj de UEA kaj TEJO apartenis al la ĉefaj temoj de la komitataj debatoj en Varno. La nova Statuto de TEJO estis por la Komitato de UEA relative facile digestebla, ĉar TEJO mem jam pasintjare fintraktis ĝin kaj ĉi-jare en la 34a Internacia Junulara Kongreso akceptis kelkajn modifojn, kiujn rezultigis intertempaj pritraktoj en la Estraro de UEA. En Varno do la Komitato de UEA aprobis la novan Statuton de TEJO. Nova



Statuto de UEA mem montriĝis, kiel atendeble, multe pli komplika demando. Oni diskutis pri ĝi — fakte nur pri ĝiaj unuaj artikoloj — en du komitataj kunsidoj. Temas pri — por tiel diri — antaŭprojekto statuta, kiun pretigis d-ro Tonkin surbaze de la tuta pristatuta laboro okazinta dum pluraj lastaj jaroj. La Komitato restas ankoraŭ malproksime de la momento kiam ĝi eventuale transprenos la nunan antaŭprojekton kiel sian propran statutproponon kaj do voĉdonigos pri ĝi la tutan membraron de UEA. Tamen, en Varno montriĝis, ke la nuna antaŭprojekto formas bonan bazon por plua ne nur komitata sed ankaŭ publika debato. Tial estas decidite vaste diskutigi la projekton per ĝia aperigo. La Komitato elektis apartan komisionon, kiu sekvu tiun opini-interŝanĝon kaj revenu al la Komitato dum la Kongreso en Lucerno, kiam oni plutraktos la demandon.

Estas multaj aliaj temoj kiuj okupis la atenton de la Komitato en la 63a UK. Ni verŝajne revenos al pluraj el ili en niaj sekvaj numeroj. Nun ni menciuj ankoraŭ, ke la Komitato okupiĝis pri la ĉi-jara 30a datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, reelekto de la estraro de CED, modifoj de la Kongresa Regularo kaj

Regularo pri la Honora Patrona Komitato, elektoj en 1980, eksteraj rilatoj de la Asocio, faka kaj landa agado, edukado, informado, virina agado, ISU, kongresoj ktp.

ESTRARO: Oficiale, la Estraro de UEA kunsidis en Varno sesfoje (unufoje kun la Estraro de TEJO), sed la estraranoj — ĉiuj ĉeestis la Kongreson — kunsidis almenaŭ tiom da fojoj ankoraŭ, klopodante eluzi la ĉeeston de delegitaroj aŭ kongresanoj el landoj, kiuj neregule reprezentigas en la Kongresoj (Ĉinio, Soveta Unio, Vjetnamio). Plimulto de la estrarkunsida tempo konsumiĝis per sekvo de aktualaj kongresaj demandoj kaj preparoj por la komitatkunsidoj. Tamen, aparta atento dediĉiĝis al la venontjara UK en Lucerno, Eŭropa Klubo (ĝiaj funkciuloj partoprenis parton de estrarkunsido), redistribuo de la taskoj en la Estraro, administrado de la Asocio, ktp.

ĜENERALAJ KUNSIDOJ:

Ĉu utila inventaro?

DUA ĜENERALA KUNSIDO: Pasintjare en Rejkjaviko oni tre bone traktis la kongresan ĉeftemon, ne nur pro tio, ke estis faritaj zorgaj preparlaboroj — tio okazis ankaŭ ĉi-jare —, sed verŝajne ankaŭ pro la fakto, ke tiu pasintjara ĉeftemo estis iom ĝenerala, iom ekstermovada (La rajto je komunikado). Kiam oni por la kongresa ĉeftemo elektas demandon aŭ agadkampon, kiu rekte tuŝas la Movadon (ĉi-jare: Internacia lingvo — Internacia edukado), oni riskas — spite ĉiujn preparlaborojn —, ke en la debatoj denove stariĝas tiuj ĉiamaj kongresaj parolantoj, kiuj komencas konvinkadi nin pri la utileco kaj

genieco de la zamenhofa lingvo. Ili ŝajne ne komprenas, ke ni ĉiuj estas en ĉi tiu Movado ĝuste ĉar ni estas plene konvinkitaj pri tio, kion ili "malkovras" al ni. En tia maniero, oni ankaŭ ĉi-jare sukcesis grandparte maltrafi la kongresan ĉeftemon, kiu ja celis, almenaŭ duone, ekstermovadan agadsferon. Iom da valoraj diskutoj okazis en iuj el entute dek diskutrondoj pri la diversaj aspektoj de la ĉeftemo. Fakte, tiel kelkcento da diskutintoj sufiĉe elĉerpe inventaris la aspektojn kaj problemojn de la Esperanto-instruado ĝenerale (memlernado, korespondaj kursoj, eksterlernejaj kursoj, varbado al kursoj, novaj parolantoj, Esperanto kaj Afriko, E-lernado kaj klerigo). Tiu inventaro ja povus montriĝi tre utila en la estonta agado sur la eduka kampo en la Movado, tamen, ĝi nur parte rilatis al la kongresa ĉeftemo. La ĉeftemon traktis unu el la dek diskutrondoj. Al ĝi dediĉiĝis ankaŭ kelkaj publikaj elpaŝoj en la Dua Ĝenerala Kunsido mem, kiu en sia tuteco, tamen, similis nur al unu plia kaj pli granda "diskutrondo" pri la samaj kaj kelkaj aldonaj aspektoj ne tiom de la kongresa ĉeftemo, kiom de la Esperanto-instruado ĝenerale. Ekzistis aliflanke kiel baza dokumento pri la ĉeftemo tiu *Rekomendo pri edukado* de Unesko, kiu akompanis nian decembran numeron pasintjare. Nur manpleno da diskutintoj traktis tiun dokumenton en la Dua Ĝenerala Kunsido kaj tiel do trafis ankaŭ la kongresan ĉeftemon.

UNUA ĜENERALA KUNSIDO: Ĝi, tradicie, devis trakti la Estraran Raporton sed, ankaŭ tradicie, ĝi traktis ĉion eblan, kio havas kaj ne havas rilatojn al la Movado, oni eĉ kantis, faris "kortuŝajn" salutojn al siaj korespondantoj pere de la publika mikrofono en la salonego. Estas tempo konstati, ke necesas funde reorganizi tiajn ĝeneralajn kunsidojn, se ni ne volas tradicie perdi kelkajn horojn dum ĉiu el niaj Kongresoj.

Rezolucio

DE LA 63a UK DE ESPERANTO

La partoprenantoj en la 63a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Varna, Bulgario, de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 1978, diskutis pri la temo "Internacia lingvo — Internacia edukado".

Ili konstatis, ke:

- la ĉiaspecaj rilatoj trans landaj, kulturaj kaj lingvaj limoj fariĝas pli kaj pli multnombraj kaj multflankaj, kaj ke same rapide kreskas la neceso pri sendiskriminacia kunlaborado trans tiuj limoj;
- edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco estas nepre antaŭkondiĉo por atingi harmonian kaj justan disvolviĝon de tiuj rilatoj kaj de tiu kunlaborado;
- ekzistas ne preteratentebaj aspektoj lingvaj de la edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco.

Ili alvokas la internaciajn kaj landajn instituciojn kaj organizaĵojn:

- aparte memori la esencan gravecon de edukado al internacia kompreniĝo en spirito de egaleco kaj reciproka respekto, esprimitan ekzemple en la Rekomendo de Unesko pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj;
- prikonsideri, ke tiu eduka procedo etendiĝas tra la tuta vivo kaj ne estas limigita nur al formala klerigo;
- atenti, ke internacia kompreniĝo antaŭsupozigas la necesajn rimedojn, inkluzive de la lingvaj rimedoj;
- esplori la efikon al internacia kompreniĝo de la nuna lerneja kaj eksterlerneja edukado, kaj pristudi alternativajn modelojn, utiligante ankaŭ la eksperimentojn faritajn kaj faratajn en pluraj landoj, interalie sub aŭspicio de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI), pri la lerneja instruado de la Internacia Lingvo Esperanto;
- kaj esplori la spertojn akiritajn dum pli ol naŭdek jaroj per la lernado kaj uzado de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu, ebligante senperan ĉiudirektan aliron al aliaj kulturoj, edukas siajn uzantojn al plivastigo de la propra alrigardo al la mondo kaj al respekto de kultura diverseco.

Granda intereso pri esperantologio

UNUAFOJE en la historio de UK okazis Esperantologia Konferenco, kiun aŭspiciis ISU kaj CED. Ĝi kunidis en la salono, kiu portis la nomon de la fama esperantologo Drezen, dum tri tagoj – lundon, mardon kaj ĵaŭdon de la kongresa semajno. Ĉiutage okazis tri 20 – 30-minutaj prelegoj kun posta pridiskuto. Nome de CED la Konferencon bonvenigis d-ro Jonathan Pool (Usono).

Gvidanto de la Konferenco d-ro Detlev Blanke (Germana DR) en la enkonduka prelego emfazis la gravecon de esperantologiaj esploroj kaj la neceson eduki novajn esperantologojn. Li analizis faktorojn, de kiuj dependas solvo de la lingva problemo, la celojn de esperantologiaj esploroj kaj la unuavicaĵajn taskojn ĉi-kampe.

Prof. N. Kawasaki (Japanio) dediĉis sian prelegon al la problemoj de lingvistika terminaro. Li atentigis pri kelkaj dubindaĵoj en la jam ekzistantaj (manuskripte) lingvistikaj vortaroj kaj en *PIV*.

La prelego de prof. O. Reiersøl (Norvegio) temis pri kriterioj por kreo de matematikaj terminoj. Li skizis eblajn metodojn por krei la terminojn kaj donis plurajn ekzemplojn.

Akademiano K. Piĉ (Ĉeĥoslovakio) prezentis originalan koncepton pri la evoluo de Esperanto. Li asertis, ke ĝi estas komputila, absoluta lingvo kun strikta interna fundamento. En la prelego estis proponita periodigo de la E-evoluo.

F. Lo Jacomo (Francio) parolis pri lingva balasto kiel la ĉefa faktoro de la evoluo. La balasto (eroj de la teksto, kiuj ne portas necesajn informojn) estas des pli ampleksa, ju pli malrapida estas la teksto-generado: ekz. parola balasto superas la skriban.

B. Kolker (Soveta Unio) emfazis la gravecon de interlingvistikaj laboroj por la ĝenerala lingvistiko kaj informis pri la historio kaj la nuna stato de interlingvistiko en USSR, aparte atentigante pri la studoj de E. Drezen, E. Bokarev, V. Grigorjev (ne Georgiev, kiel erare informis la Gazetara Servo) kaj M. Isaev.

La prelego de akademiano S. Ĝuĝev (Bulgario) estis provo de estetika analizo de la Internacia Lingvo. Ĉar el ĉiuj belartoj al la lingvo pleje proksimas la muziko, li proponis juĝi pri estetikaj kvalitoj de la lingvo, analizante ĝin kiel muzikan fenomenon laŭ muziksciencaj kriterioj.

Mag. Á. Böldvarsson (Islando) prelegis pri rilato inter vortoj kaj nocioj en Esperanto kaj okcident-eŭropaj lingvoj. Laŭ li, oni ne ĉiam atentigas, ke en diversaj lingvoj grupigo de nocioj okazas diversmaniere, kaj ke nocioj mem ofte ne havas precizajn limojn, pro tio ĉe pluraj okcidenteŭropanoj rimarkeblas troa eŭropismo de esprimoj.

D-ro W.A. Verloren van Themaat (Nederland) analizis la internacian vortaron kiel bazon de planlingvo, prezentis kriteriojn de internacieco kaj interesajn komparaĵojn de Esperanto kaj Interlingua.

Ĉiu triopo da prelegoj (listigitaj ĉi-supre laŭvice) elvokis viglajn diskutojn, en kiuj partoprenis A. Münnich, B. Moon, C. Conterno, J. Balbin, A. de' Giorgi k.a. Ĉe la fino d-ro Blanke resumis la tuton, emfazante la egan intereson de la kongresanoj (la salono ĉiuforte estis plenplena) kaj la nepran neceson organizi tiajn konferencojn ankaŭ dum la venontaj UK. Prof. Kawamura (Japanio) dankis al la gvidanto de la Konferenco nome de ISU.

Viktor Aroloviĉ



Multaj novaj prelegantoj en la 31a sesio de ISU en Varno (de maldekstre): S. Krajnov, M. Landmark, V. Benczik, L.G. Kárpáti kaj A. Boia.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO:

Novaj prelegantoj

PROF. Vasil Peevski, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, rektoris en la 31a sesio de la Internacia Somera Universitato (ISU) en Varno. El la planitaj 12 prelegoj okazis nur 10, pro nealveno de du prelegantoj (M.T. Popov el Soveta Unio kaj So Gil-su el Koreo). Antaŭ malsama nombro de interesitoj (inter 50 kaj 200 aŭskultantoj) prelegis: M. Landmark, Norvegio (Pri unu tipo de malfacilaĵo en la lernado de skribado), V. Ĉoĉov, Bulgario (Utiligado de la libera tempo; socialaj kaj psikologiaj aspektoj), V. Benczik, Hungario (Teoriaj problemoj de la Esperanta literaturo), A. Boia, Rumanio (La baza vortprovizo kaj la vortstatistikaj studoj en Esperanto), W.M.A. de Smet, Belgio (La balenoj, minacataj gigantoj de la oceanoj), S. Krajnov, Soveta Unio (Hipofeo – kuraca, nutra kaj grundonpliboniga planto de Eŭrazio), J. Pool, Usono (Elementa modelo por la solvado de la problemo de lingva diverseco), L.G. Kárpáti, Hungario (Komputilaj retoj kaj la lingva problemoj), S. Yamazoe, Japanio (Kio estas prostaglandinoj?) kaj S. Kawamura, Japanio (Plantaj fibroj kiel komponaĵoj de manĝaĵoj). La 31an sesion de ISU karakterizas prezentiĝo de pluraj novaj bonaj prelegantoj. Konsiderindan atenton fortiris de ISU la programa novaĵo – Esperantologia Konferenco, kiu estonte eventuale fariĝu konsista parto de ISU mem.

Movada arta metropolo

LA KONGRESA LIBRO prave aludis, ke ni en Varno fakte havos plenan "Internacian Artan Festivalon" — kiel en Sofio en 1963 — kaj ke mankos nur oficiale nomi la artajn aranĝojn per tiu impona titolo. Ni do havis tiun festivalon, kvankam ĝi estis pli bulgara ol internacia. Juste, ĉar Bulgario jam dum pluraj jaroj estas la arta metropolo de la Movado. Se Kiril Draĵev, kiu zorgis pri la artaj aranĝoj en la LKK, ne gajnis ĉi-jare senrezervajn komplimentojn de nia teatra recenziŝto, li certe meritas aklamon pro la abundo kaj nivelo de la artaj programoj dum la 63a UK.

Bulgara Vespero surscenigis denove la kanthoron de Targoviŝte, ensemblon al kiu la tuta Kongreso dankas grandan parton de sia imponeco. Internacia kantbuke-do de la koruso sonis majeste kaj montris la tutan kvalitogamon de ĉi tiu amatora sed profesinivela kolek-tivo. Kantistinoj Stojanova kaj Kostova atentigis nin, kiel ni povis konstati ankaŭ en aliaj artaj programoj, ke en Bulgario ekzistas tuta taĉmento da kantistoj en la Internacia Lingvo kaj ke nia kongresa elekto ne de-vas daŭre resti ĉe Maria Angelova. La aktora paro Beleva—Anev venkis la malavantaĝojn de la enorma scenejo kaj rikoltis aplaŭdegon pro sia interpreto de *Dio absolvu*, farso de E. Pelin. La Folkloro Dancensem-blo de Varna denove atentigis nin pri la majesto de la bulgara popola dancarto. Kiel komplimenti reprezen-tan dancetronon el lando, kie la tuta popolo ja estas nur unu giganta dancensemblo?

Veselin Damjanov havis en Varno memstaran koncerton, kiu pli-malpli estis nur publika prezento de lia okaze de la Kongreso eldonita grandformata disko *Veselin Damjanov kantas en Esperanto*. (Tiu diskon baldaŭ ofertas al siaj klientoj la Libroŝerbo de UEA). Damja-nov devus baldaŭ refreŝigi sian repertuaron, precipe por tiuj kiuj lian arton jam plurfoje aŭskultis.



En Varno prezentiĝis deko da internacinivelaj kantistoj.

La anoncita "Koncerto de tri ĥoroj" fine ne estis pre-cize tio, sed ĝi montriĝis, pro sia kvalito kaj pro la en-programigo dum posttagmezo, nobla alternativo por la kongresanoj, kiuj jam lacis de kunsidaj tabloj. "Distra foiro" estis foje tro leĝera, foje tro serioza — do, tute foira. Ankaŭ en la estontaj kongresprogramoj troviĝu loko por tiaj aranĝoj.

Internacia Arta Vespero estis akcentite bulgara, sed ankaŭ akcentite bonkvalita. El la bukedo de altnivelaj gekantistoj elstaris polino Zborovska, kies voĉo estas eĉ pli bela ol ŝi. Miroslav Smyčka montris al ni, kiom gravas, kiam la artisto majstras la kantlingvon. Jadwiga Gibczyńska faris en Varno perfektan lecionon pri la arto deklami.

Trajto de ĉiuj vesperaj aranĝoj en Varno — kiel cetere ankaŭ en pluraj lastatempaj Kongresoj — estas ilia daŭ-ro, ne konvena por homoj, kiuj ja laboregas (eĉ se nur kunside) dum la tuta tago. Oni estonte pensu pri tio kaj duoble profitu elĵetante kelkajn programerojn.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1978:

Rezultoj

Konkuris entute 178 verkoj, el kiuj la juĝkomisiono premiis jenajn:

POEZIO: Unua premio: **Kris Long** (Britio) por *Poemoj sen nomo*; Dua premio: **Rejna de Jong** (Nederlando) por *La merlo*; Tria premio: **Mauro Nervi** (Italio) por *La turoj de l'ĉefurbo*; Laŭda mencio: **Aldo de' Giorgi** (Italio) por *Ĝis*.

PROZO: Unua premio: **Spomenka Štimec** (Jugoslavio) por *Nepagipova lando*; Dua premio: **Éva Tófalvi** (Hungario) por *Historio de nia amikeco*; Tria premio (en egaleco): **Ludoviko Izák** (Ĉeĥoslovakio) por *Somera interludo* kaj R.A. Konstantinova (Bulgario) por *La eta ruĝa albumo*.

TEATRAĴO: Unua premio: **Mauro Nervi** (Italio) por *Klitemnestra*; Dua premio: **Vesna Skaljer-Race** (Jugo-slavio) por *En juĝejo*; Tria premio: **Bernard Golden** (Hungario) por *Saluto al paradizo*.

ESEO (Premio Luigi Minnaja): **Karolo Piĉ** (Ĉeĥoslo-vakio) por *Lingvistikaj problemoj de la originala romano Esperanta*.

NOVA TALENTO (Pokalo Harabaĝiu): **Barbara Soko-lówna** (Pollando) por la prozaĵo *Doktorino Emilia*.

FOTOGRAFIO: Unua premio: **Leila Kantonen** (Finn-lando) por "Sen vortoj"; Dua premio: **Zdravko Niko-lov** (Bulgario) por "Generacioj"; Tria premio: **Leszek Wolski** (Pollando) por "Ne plu militon"; Laŭdaj men-cioj: **Jarmila Rybáčková** (Ĉeĥoslovakio) por "Ĝojo", **Zdravko Nikolov** (Bulgario) por "Je alies kosto" kaj "Solaj", **Leszek Wolski** (Pollando) por "Ekinteresiĝo".

Pli detala raporto aperos en nia oktobra numero.

BET meritas teatran ejon

Okaze de sia 20-jara jubileo, Bulgara Esperanto-Teatro restis fidela al sia historio: brila aktora grupo klopodas savi eksmodiĝintan tekston sur nekonvena scenejo. Ludi en sporta areno, inter deko da mikrofonoj, antaŭ hordo da lumbildaj fotistoj — tio estas ĉio alia krom etoso por la teatra arto. BET estonte devus insisti pri pli favoraj fizikaj kondiĉoj por siaj spektakloj. Ĝia 20-jara historio pravigas tian insiston. Ĝia arto meritas verajn teatrajn kondiĉojn.

“NAVIGI estas necese” — diris la antikvaj romianoj. Tio montriĝas vera ankaŭ koncerne Esperanton. Se ekzistas internacia lingvo, devas ekzisti internacia arto. Ĉar, malgraŭ la skeptikeco de multaj, pli efikas komuna kantado, ol miloj da saĝaj argumentoj pri la utilo de internacia idiomo. Tial la Esperanto-kulturo, kaj precipe ĝia buŝa formo, ekzemple la teatra agado, havas grandegan rolon en la vivo de la lingvo.

Ĝuste ĉi-jare Bulgara Esperanto-Teatro (BET) festas sian 20-jaran jubileon. Sub la gvido de Kiril Draĵev, ĝi havis multajn sukcesojn en la propagando de Esperanto, en la evoluigo de la lingva nivelo kaj en la konigo de la bulgara kulturo. Tial Kiril Draĵev ĵus ricevis la arĝentan gradon de la prestiĝa bulgara Ordeno de Cirilo kaj Metodo. (Cetere, la oran gradon de tiu ordeno antaŭ kelkaj jaroj ricevis la Bulgara Esperantista Asocio).

Ankaŭ ĉi-jare la kongresanaro havis la eblon ĝui la ludon de BET. Sur la scenejo aperis la vivo de mezklasa bulgara familio en la fino de la pasinta jarcento. La komedio de Anton Straŝimirov (1872-1937) respegulas la problemojn de burĝiganta socio, en kiu konserviĝis moroj mezepokaj aŭ eĉ pli malnovaj. Laŭ tiuj kutimoj, la plej altan rangon en la domo havis la patrino, kiu regis super ĉiuj siaj familianoj. Tiu vivmaniero ne harmoniis jam kun la stato de la socio. Tiel estiĝis la teatraĵo de Straŝimirov *La bopatrino*, kiun BET prezentis sub la titolo *La megero*. En sia komedio Straŝimirov priridas la eksmodiĝintajn morojn kaj batalas por pli moderna, pli libera vivmaniero. Tiu ĉi sinteno kaj la rolo de la verkaro de Straŝimirov en la formiĝo de la moderna bulgara kulturo faras la komedion klasika.

La granda halo de la Varna Sportpalaco enhavis pli ol kvarmil spektantojn el diversaj partoj de la mondo. Ili havas malsamajn konceptojn pri la arto, teatro, komedio. Mi konjektas, ke multaj el ni ne komprenis ĉiun nuancon de la enhavo de tiu ĉi teatra peco. Tiamaniere la efiko de la prezentado ne estis kompleta. Oni krome devas konfesi, ke la intrigo de la komedio estas iom tro simpla: Bopatrino volas esti mastrino; ŝi turmentas sian bofilinon, kiu fuĝas; poste filino najbara instruas la “megeron” pri bonaj moroj; ĉe la fino ĉio denove en-

ordas. Por la hodiaŭa spektanto ĉio ĉi povas ŝajni iom banala, kaj nur majstra reĝisorado kaj aktora ludo povas plaĉigi al ni la prezentadon.

Ivan Dobĉev, la reĝisoro, uzis iom lantajn ilojn por viviĝi la malnovan pecon. Tiu lia strebado ĉi-foje ne estis sukcesa. Oni ne ĉiam komprenis kial la aktoroj senĉese rondkuras la scenejon, kial ili staras sur seĝoj aŭ kaŝas sin sub la tablo.

El la iom tro laŭta ludado de la aktoroj, spegulanta la reĝisorajn intencojn, elstaris la ludo de M. Duparinova, T. Jurukov kaj A. Andreeva. La prezentiĝo de BET en Varna estis altkvalita, eĉ se ne ĉiudetala sukceso.

P. Rados

La kongresanoj ne havis tiun ĝuon: “La megero” sur vera teatra scenejo.



POLA ESPERANTO-TEATRO ludis la 4an de aŭgusto la komedion *Hipnoto* de A. Cwojdzinski, kies premiero okazis en la pasintjara UK. Antaŭ ĉ. 500 spektantoj en la enorma salonego, sur la scenejo vasta kiel mezgranda teatrejo, Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński ludis pli leĝere kaj memfide ol en Rejkjaviko, sed ilia fajna arto ofte absorbiĝis en la salonan vakuon. Ni jam pasintjare esprimis dubojn pri la teksto de *Hipnoto*. Se oni jam surscenigas tiajn duarangajn tekstojn (tion faras ankaŭ BET), kial ne ludi originalan Esperanto-teatraĵon por rikolti almenaŭ tiurilatajn meritojn? En tia salonego (tio validas ankaŭ por la prezentaĵo de BET) oni apenaŭ vidas aktorojn kaj tute maltrafas iliajn mienojn, tiel ke la tuto similas al publika aŭskultado de ĝene laŭta radio-dramo.

ŜTATA PUPTEATRO VARNA prezentiĝis kvinfoje dum la kongresa semajno al pluraj centoj da kongresanoj. Kvarfoje oni ludis la spektaklon *La dormanta belulino* de C. Perrault kaj unufoje *La ora birdo* de M. Asenov. La pupteatristoj, kiuj pasintjare gajnis per *La dormanta belulino* la unuan premion en la 10a Pupteatra Internacia Festivalo en Zagreb, saĝe insistis gastigi la kongresanojn en sia propra teatrejo, anstataŭ aventuri en salono de la kongresejo mem. Interalie pro tio la kvin pupteatraj spektakloj estis la plej teatraj programeroj de la 63a UK.

Kelklinie pri...

LOKITA proksime al la fino de la kongresa revu-numero, ĉi tiu paĝo trudiĝas kvazaŭ ia "malenhavo", ĉar ĝin eniras mencioj de la aranĝoj por kiuj ne restis spaco en la ceteraj paĝoj de la numero. Tio tamen neniel rilatas la gravecon aŭ sukceson de la aranĝoj ĉi tie menciitaj; la ekzisto de ĉi tiu paĝo estas simpla signo de redaktora kapitulaco provante en 20 paĝoj bildigi du mamute grandajn internaciajn kongresojn, kiuj havis ne nur kvinmilon da partoprenantoj sed ankaŭ kelkcenton da programeroj.

AKCEPTOJ: La Alta Protektanto aranĝis por kvincent kongresanoj el ĉiuj landoj reprezentitaj en la UK tre luksan akcepton, kiu havis plurajn trajtojn de riĉa bankedo. Ĝi daŭris preskaŭ du horojn kaj okazis en la modernaj kaj komfortaj salonoj de la hotelo "Nigra Maro". Okazis aparta akcepto por la membroj de Societo Zamenhof. Tiun akcepton faris la prezidanto de UEA, kiu ankaŭ post la Teatra Vespero invitis kelkdekon da verkistoj kaj aliaj aktivuloj sur la kultura kampo al speciala akcepto okaze de la 20-jara jubileo de Bulgara Esperanto-Teatro. Ŝtata Komitato de la Bulgaraj Virinoj regalis aktivulinojn de la Movado per speciala lunĉo, kiun ĉeestis ankaŭ la prezidantino de tiu Komitato. Pluraj diplomatoj faris akceptojn por sialandaj kongresanoj.

BALO KAJ BANKEDO: Ambaŭ tradiciaj aranĝoj okazis kaj estis sukcesaj kvankam la salonoj neniel apartenis al la plej konvenaj ejoj por tiaj programeroj.

EKSPOZICIOJ: "Kopernik en la pola popola arto" estis la titolo de tre sukcesa ekspozicio, lokita en salonoj apud la kongresejo. Multan atenton altiris ankaŭ speciala filatela ekspozicio en la kongresejo mem.

INFANA KONGRESETO: Fine, post plurjaraj provoj, okazis la 16a Internacia Infana Kongreseto, kun partopreno de ĉ. 70 geknaboj ĉefe el Bulgario mem, Hungario kaj Pollando.

KVIZO: Ĝi denove nomiĝis "Por ke vi sciu..." kaj denove montris, ke oni malmulton scias. Ŝajnas, ke ne sufiĉas nur meti en la programon tiun scikonkurson kaj poste dum la kongresa semajno postkuri eventualajn partoprenantojn. Tamen, tio ne malgrandigu la sukceson de la gajnintoj (S. MacGill, M. Lipari, I. Bujdosó) kaj la klopodojn de la gvidanto (A. de' Giorgi).

DISERVO: Ekumena Diservo kunvenigis pli ol mil homojn en la urba katedralo. Tiun sukcesan aranĝon organizis kune IKUE, KELI kaj la Bulgara Ortodoksa Eklezio.

CSEH-METODO: Okazis Seminario por instruistoj (80 partoprenantoj) kaj kurso por komencantoj (pli ol 100 kursanoj).

VIRINA PROGRAMO: Temis preskaŭ pri kongreso en la Kongreso, ĉar la Komisiono por Virina Agado organizis tutan aron da kunvenoj, prelegoj, vizitoj ktp. Okazis ankaŭ aparta podia diskuto. Eble ni ja revenos al

tiuj kunvenoj en la sekvaj numeroj, sed jam nun stariĝas la demando: Kial, ekzemple, insisti pri apartaj prelegoj por la virinoj? Kial bonaj virinaj prelegoj — kaj okazis tiaj — simple ne eniru la programon de ISU?

FAKAJ KUNVENOJ: Okazis plurdeko da tiaj kunvenoj; kelkaj fakaj organizaĵoj havis eĉ po tri kunvenojn. Aŭtomobilistoj elektis novan prezidanton (G. Kühlmann), sciencistoj (ISAE) kunvenis unuafoje kun sia nova estraro, instruistoj (ILEI) bonvenigis reprezentanton de la bulgara edukministerio kaj diskutis pri la planata ILEI-konferenco en Madagaskaro, medicinistoj premiis ses sciencajn verkaĵojn kaj aranĝis sian jam tradician bankedon en la plej luksa hotelo de Varno, agrikulturistoj diskutis terminologiajn demandojn, foto-, kino-, kaj magnetofon-amatoroj elektis novan estraron (prezidanto: D. Hitrov), Mondpaca Esperantista Movado festis sian 25-jaran ekziston, filologoj traktis du fakajn temojn. Kunvenis ankaŭ fervojistoj, juristoj, poŝtistoj, radioamatoroj, ornitologoj, bahaanoj, KELI, IKUE, komputilistoj, aeronaŭtikistoj, akademianoj, veteranoj kaj multaj aliaj. Okazis aparta Asembleo de Fakaj Asocioj.

AGADO ĈE UNUIGINTAJ NACIOJ: Sub prezido de d-ro Tonkin, ĉ. 70 personoj diskutis pri tiu aspekto de la eksteraj rilatoj de UEA. Ĉeestis ankaŭ s-ro Zahariev, reprezentanto de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, kaj parolis pri la rilatoj kun tiu organizaĵo.

JUNULARAJ PROGRAMEROJ: Krom la junulara vespero kaj la programero "TEJO sin prezentas", okazis ankaŭ podia diskuto pri la rolo de la Esperanta kulturo en la disvastigo de la Internacia Lingvo.

FOIROJ: Foiro de kolektantoj kunvenigis plurdekon da personoj. Turisma Foiro estis nur provo sukcesigita aranĝon.

POŝTMARKO: Okaze de la UK, Bulgara Poŝto eldonis specialan poŝtmarkon (v. la bildon), kies eldonkvanto



ŝajne estis nekutime malgranda (onidire nur cent mil), tiel ke ĝi tre rapide fariĝos raraĵo en la filatela merkato.

SOLENA FERMO: Ĝoja por la organizantoj, trista por la plimulto de la kongresanoj, la Solena Fermo ankaŭ en Varno estis impona kaj digna. Ĝi fluis bele, resumis la eventoriĉan semajnon, aklame akceptis la Rezolucion (v. p. 161) kaj havis tiun promesplenan invitan aromon de la venontjara Kongreso en Svislando. Ne mankis dankoj kaj gratuloj. La Himno en iom lanta ritmo metis la finan punkton al la 63a UK.



34^a KONGRESO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

22-29 VII 1978 VELIKO TARNOVO

34a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
de TEJO, Veliko Tarnovo 1978 07 22 – 29:

Amase kaj sukcese

LA 34-a INTERNACIA Junulara Kongreso okazis meze de la meznorda Bulgario, en regiono de sovaĝa natura beleco, en la urbo Veliko Tarnovo, merite fama pro siaj unika arkitekturo kaj riĉa historio. La Kongreso komenciĝis, disvolviĝis, kaj finiĝis, kaj lasis al ni la ĉiaman demandon: Kiel ĝi diferencis de la antaŭaj?

Pri la similecoj oni apenaŭ bezonas paroli – la interkona vespero, laborgrupoj, ekskursoj, internacia vespero – sed ankaŭ la diferencoj percepteblis kaj ĝuste ili nin interesas.

Unuavice, kaj antaŭvideble, estis la amasa partopreno el orienteŭropaj landoj. El Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Jugoslavio kaj Bulgario mem venis kelkcent partoprenantoj, kio ebligis preskaŭ rekordan por IJK grandecon de 450 homoj el 26 landoj.

Relative nova kaj bonaŭgura evento estis la ĉeesto de kongresanoj ankaŭ el Soveta Unio, unu el kiuj prezentis mallongan prelegon kadre de la laborgrupo pri "La junularo kaj la movado por malstreĉiĝo", skizante i.a. la nunan staton de la soveta Esperanta junulara movado. Due, la rilatoj ĉi-jare kun la registaraj instancoj, kun la gazetaro, kun la reprezentantoj de la televido kaj radio estis aparte bonaj. La kongresa ĉeesto estis tre alte aprezata de Veliko Tarnovo, kaj tiun aprezon ĝi vidigis per sia supermezura gastamo kaj la granda atento montrita al la diversaj kongresaj eroj.

Oni apenaŭ povus aserti, ke kulturaj aranĝoj ne estas jam tradiciaj en IJK-oj, sed la kvanto de la ĉi-jaraj kontribuoj kaj la grado de ilia penetro en ĉiujn facetojn de la Kongreso estis preskaŭ unikaj. Eĉ la vizito al junulara labortendaro – ofte la okazo por pluevoluigo de junaj muskoloj – montriĝis scenejo por la prezentado de junulara muziko kaj komikaj teatraĵetoj.

Ke ni gastis en Bulgario estis klare tra la tuta semajno. Multe pli ol en antaŭaj kongresoj, ni ricevis la impreson, ke la lando estis preta prezenti sin al ni: sian arton, sian dancadon, siajn kutimojn, kaj siajn pensmanierojn (speciale montritajn, ekz., dum nia solena renkontiĝo kun la brigadanoj antaŭ svarmo da filmkameronoj kaj ĵurnalistoj).

Kun kelkaj esceptoj rilate internan informadon, la organizado estis surprize bona. Oni rapide alkutimiĝis al la (ĉu bulgara?) kutimo de malfruigado, kaj la eksterprogramaj, neatenditaj eroj donis belan dimension al la kongresa etoso. Neforgesebla estis tiu vespero, kiam spontane organiziĝis serio de inic-ceremonioj por "novicoj", kiuj venis unuafoje al IJK.

Jim Cushing



S-ro Dimitar Papazov (maldekstre) gvidis la organizajn laborojn de la 34a IJK kaj, kun granda grupo de kompetentaj gejunuloj, sukcesis prizorgi preskaŭ senriproĉan funkciadon de la Kongreso. Poste en Varno, dum la UK, ni ofte demandis nin: Kie estas tiuj organizaj kompetentuloj el Veliko Tarnovo? Malfacilas kompreni kial Bulgara Esperantista Junularo ne ludis pli aktivan rolon en la funkciigo de la kongresaj laboroj en Varno, des pli ke Veliko Tarnovo estis klara pruvo pri ĝiaj kompetentoj. Ĉu nepre necesas maljuniĝi por gajni postenon en LKK de Universala Kongreso?



TEJO-KOMITATO EN VELIKO TARNOVO:

Pli da aktiveco

LA KOMITATO de TEJO kunvenas, same kiel tiu de UEA, nur unufoje jare, dum la Internaciaj Junularaj Kongresoj de TEJO. Tamen, en tiu kongresa semajno oni faras klopodojn transformi la unufojan kunveneblecon en kiel eble pli da komitatkunsidoj. Tiel estis ankaŭ en Veliko Tarnovo, kie la Komitato kunvenis entute kvinfoje, dum proksimume 12 horoj entute. La Kongreson partoprenis ĉ. 40 komitatanoj, kompare kun la pasintjara IJK en Poitiers, kie ĉeestis nur trideko da komitatanoj kaj traktis pli ampleksan tagordon, ol oni faris ĉi-jare. Bona antaŭpreparo estis ĉ. 40-paĝa raporto de la Estraro de TEJO, ĉar tiu dokumento enfokusigis plurajn demandojn, kiuj ankaŭ en Veliko Tarnovo troviĝis en la komitata tagordo. Krome, konstateblis en ĉi tiuj kunsidoj multe pli bona informiteco de la komitatanoj pri la laboroj de TEJO, kio siavice devus signifi ĝenerale pli aktivan rilaton de la komitatanoj al la laboroj de la Organizo.

Dum la 34a IJK la Komitato akceptis la aliĝpeton de la junulara sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Tiel la nombro de la landaj sekcioj de TEJO altiĝis al entute 31. En la venontaj jaroj oni povas atendi pliajn aliĝojn kaj stabiliĝon de la junularaj Esperanto-organizaĵoj en kelkaj movade novaj landoj, kiel ekzemple Bolivio kaj Rumanio.

Statuto de TEJO ricevis en Veliko Tarnovo definitivan aprobon de la Komitato, tiel ke ĝi povis akceptiĝi ankaŭ en la Komitato de UEA en Varno (v. p. 160). La nova Statuto baldaŭ aperos kaj distribuiĝos al la membraro. Tamen, en la organiza vivo de TEJO ludas preskaŭ statutan gravecon alia dokumento — Beograda Interkonsento, kiu restas valida, sed kun komitata komisiono al la Estraro ekzameni kaj eventuale renegoci kelkajn erojn de tiu dokumento, kiu difinas la financajn kaj administrajn rilatojn inter TEJO kaj UEA.

Ankaŭ la Komitato de TEJO havas siajn komisionojn, kies konsiston kaj taskojn oni precizigis en la IJK, kie la Komitato elektis plian komisionon, kiu ŝanĝos sian konsiston ĉiujare kaj zorgos ekskluzive pri la ĝustatem-

paj preparoj por la traktado de la aktuala kongresa temo (en Veliko Tarnovo ĝi titoliĝis: "Esperanto kaj interjunulara amikeco"). Pro longtempa barakto kun la malaktualiĝinta Kongresa Regularo de TEJO la Komitato nun formis apartan komisionon, kiu pretigos projekton de nova dokumento tiucela. Tamen, intertempe ja restas valida la ĝisnuna Regularo.

Tre interesa ŝajnas iniciato de grupo de komitatanoj kaj kunlaborantoj, kiu intencas traduki en Esperanton universitatnivelaĵajn sciencajn tekstojn. Oni jam parolas pri difinita verko kaj por tiu tuta projekto ricevis fortan apogon de la Komitato.

Kompreneble, multa diskuto rilatis la eldonaĵojn de TEJO: *Kontakto*, kiu reĝisdatiĝas, *Sufoko*, kiu reaperis en nova grafika prezento, ktp. Al sia jam impona listo de honoraj prezidantoj TEJO en Veliko Tarnovo aldonis la nomon de s-ino Claude Nourmont-Moon, kiu gvidis la Organizon en la jaroj 1975 kaj 1976. Elektiĝis ankaŭ nova Estraro, kiu ne multe malsimilas al la ĝisnuna, sed la taskoj iom alie distribuiĝis kaj nial aperigas ĉi tie plenan konsiston de la Estraro de TEJO (v. la enkadrigitan liston).

Prezidanto: Savas Tsiturides, Greklando (kunordigado)
Vicprezidanto: Csaba Lendvay, Hungario (eksteraj rilatoj)

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Nov-Zelando/Nederlando (rilatoj kun UEA, "Kontakto")

Ĝenerala sekretario: Brunetto Casini, Italio (eduko de gvidantoj, junulardelegitoj, fakaj asocioj)

Sekretario: Thomas Bormann, FR Germanio (Komitato, individuaj membroj, eldonaĵoj krom "Kontakto")

Estrarano: Floreal Gabalda, Francio (regiona agado)

Estrarano: Imre Szabó, Hungario (landaj sekcioj)

Estrarano: Gert Van Tongerlo, Belgio (kongresoj, konferencoj, financoj)

Estrarano: Amri Wandel, Israelo (varbado)



Ĉu kreiĝas aparta movada muzika kulturo? Kantonisto Gianfranco Molle ofte koncertas en internaciaj kunvenoj; li mankis nek en Veliko Tarnovo nek en Varno.

Kongreseroj ...

Malekskursa tago

Ĝi devis okazi antaŭ la tago rezervita por la kongresaj ekskursoj. Malgraŭ ĉiuj antaŭpagoj, mendoj ktp., se vi volis akiri vian ekskursan bileton, necesis malekskursi almenaŭ duontagon, starante en longaj vicoj antaŭ la ĝiĉetoj de Balkanturist. Kiam venis via vico ĉe la ĝiĉeto, leviĝis lingvaj problemoj, ĉar ofte mankis parolanto de Esperanto. Simile estis pri loĝigo: vi estis povinta mendi unuaklasan hotelon kaj anstataŭe ricevi lokon en du-lita tendo. Ni havas belajn impresojn pri Bulgario, sed tio ne havas rilatojn kun Balkanturist.

Rendevuejo por perdiĝi

Grandioza ĝi estis, ne nur laŭ siaj dimensioj, sed ankaŭ laŭ la malordo, kiu ĝin regis precipe dum la unuaj kvin kongresaj tagoj. Tie vi povis nenion trovi, sed ekzistis bona ŝanco, ke vi mem perdiĝu. La tuta vasta ĝiĉeta vestiblo similis al la rendevua tabulo. Sed, oni rapide ĉesis plendi. Nia talento de alkitimiĝo estas respektinda.

Dormosakoj en la Inaŭguro

Post antaŭpagita tutnokta maldormo, kelkajn sekundojn antaŭ ol la plenan salonegon eniru la diplomatoj kaj aliaj honoraj gastoj, sur la ruĝan tapiŝon inter la spektejo kaj podio subite paraŝutis dudeko da lacaj gejunuloj, sternis siajn dormosakojn kaj preskaŭ ekronkis. Tio estis protesto kontraŭ la trakto, kiun la grupo ricevis flanke de Balkanturist. La grupo pravis. Malĝusta estis la sekundo kaj loko de la protesto. Ili estus devintaj tiel okupi la direktoran ĉambron ĉe Balkanturist aŭ almenaŭ la kunsidojn de la LKK.

Vana librosoifo

Konsiderante la transpagajn malfacilaĵojn kaj sekvan limigitecon de la Esperanta libromerkato, la Kongreso en Varno estis espero por miloj da orienteŭropaj kongresanoj fine akiri volumojn jarojn longe sopiratajn. Vana espero tio estis. La kongresa "Libro servo" de la Bulgara Esperantista Kooperativo havis en sia stando pli da pupoj kaj aliaj memoraĵoj ol da Esperantaj libroj. Tiu kelko da libro-titoloj konsistis el orienteŭropaj eldonaĵoj, sed kun manko de la plej freŝaj

el ili (ekz. *Slovaka Antologio* kaj *Tri-groŝa romano*). Bone prosperis la stando de Hungara Esperanto-Asocio, kiu ofertis dekon da siaj propraj eldonaĵoj.

Sporto kaj balo


La kongresejo estis ideala por la Inaŭguro, Malfermo kaj eventuale ankaŭ por la Bulgara kaj Internacia Vesperoj. Tamen, por la Balo, Teatra Vespero, Interkona Vespero k.s. ĝi neniel taŭgis. Dum la balo, se oni ne sukcesis elbatali lokon sur la netro konvena dancareo, necesis montgrimpigi al sia sidloko, supre en la dua vico de la oka tribuno. Se oni tion devis fari multfoje dum la vespero, tio ja postulis difinitajn sportajn kvalitojn. Tamen, la homoj gajis kaj sukcesis krei tute ravan etoson. Cetere, la kongresejaj servoj, la profesia stabo de la domo, funkciis modele.

Araba interpreto

Komitatanino Claude Nourmont-Moon konsternis siajn multnombrajn konatojn kiam ŝi aperis kiel interpretisto de la siria Ambasadoro, kiu faris longetan paroladon en la araba. Montriĝis tamen, ke, eĉ se ŝi neniam estis renkontinta instruiston de la araba lingvo, ŝi pli frue vidis la Ambasadoron kaj ricevis tekston, kiun ŝi tre flue kaj elegante deklamis.

Sopiraj revidoj


Ili karakterizis la tutan Kongreson. Centoj da homoj havis en Varno la finan eblecon renkonti sian sovetan, francan, polan, japanan, ĉeĥan aŭ norvegan amikon, kun kiu oni dum jaroj korespondis aŭ kunlaboris, kun kiu oni foje — antaŭ jardekoj — renkontiĝis, sed la revido restis sopiro. Varno fariĝis tia sopira rendevuejo.



Jen la supra foto por trafe ilustriti tiun fenomenon: Li estas estono, ŝi danino; li renkontis ŝin eble en infankongreseto antaŭ pli ol dudek jaroj. Neniam poste. Sed, subite en Varno, en homamaso, renkontiĝas rigardoj. Dum momento oni dubas, poste kuras unu al la alia, kaj rezultas la fotita sceno, tiel simbola por la plej baza rolo de la Internacia Lingvo.

La du prezidantoj

Ĉi tiu lasta ero de la kongresa revuo koncernas la du homojn, kiujn mencias ankaŭ la unuapaĝa teksto — Aleksiev kaj Tonkin. Ni havas du demandojn por ili du: Ĉu vere necesis, ke Tonkin gvidu, prezidu aŭ ĉefparolu en ĉiuj okdek naŭ kongresaj programeroj, kie li tion faris, brile cetere? Ĉu Aleksiev efektive estas la sola kompetenta Esperanta interpretisto en Bulgario, tiel ke li al sia grandega taskaro devis aldoni ankaŭ tiun ŝarĝon? Nu, eĉ ni estis povintaj flustri al la du prezidantoj plurajn nomojn kaj homojn, kiuj malhelpus misuzon de la prezidantoj dum la Kongresoj.



Tipa sceno ĉe la ĝiĉetoj en Varno: Atendado por poste interkompreniĝi fingre.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

La oficejo de Kanada Esperanto-Asocio translokiĝis kaj ĝia nova adreso estas: P.P. Box 2067, Sidney, B.C., V8L 3S3, Kanado. Ŝanĝiĝis ankaŭ la adreso de la asocia organo Lumo: s-ro K. Smilga, 34 Martin Road, Toronto, Ont., M4S 2V2, Kanado.

Mi estas instruisto, kaj dum la venonta lernojaro mi havos klason kun ĉ. 13-jaraj gelernantoj. Mi volas havi kontakton kun instruistoj, kiuj havos gelernantojn en tiu aĝo, i.a. por ekigi korespondadon inter niaj klasoj. Skribu al s-ro Per Edler, Dingelvik 1249, S-660 10 Dals Långed, Svedujo.

Ernesto Schlesinger, p.k. 35, R-3400 Cluj, Rumanio, serĉas seriozajn interŝanĝojn de bildkartoj en okcidentaj landoj.

Literatura instruisto deziras korespondi tutmonde: M.A. Bagherieh, Bahrami Hospital Ave. 101, Tehran 16, Irano.

57-jara fraŭlo serĉas gekorespondantojn. Miaj hobiaj estas: astrologio kaj studi la profundajn misterojn de la vivo. Mi korespondos pri ĉiaj temoj. Mi serĉas veran kaj profundan amikecon. Chester Field, 307 Newman, Knoxville, IL 61448, Usono.

18-jara patro de du filinoj deziras koresponde perfektigi sian lingvoscion: Ĥosro Iranpur, Line C1-1, Karun, Ahwaz, Irano.

Naturistoj / Nudistoj, ankaŭ en ne-transpagipovaj landoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Petu informojn kaj aliĝilon de H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Atentu, metallaboristoj! Sindikata klubo en Svedio, loko proksime de Gotenburgo, atendas pruvon pri la avantaĝo de Esp. inter sindikatanoj. Skribu, ni petegas, por instigi niajn membrojn partopreni kursojn por komencantoj. Se vi deziras korespondi, diru tion. Ni respondos al vi. Adresu: Metallaborista Klubo ĉe Kompanio ATLET AB, Pf. 138, S-435 01 Mölnlycke, Svedio.



Maria Zejer, Oś. Brody 3., m.10, PL-43-450 Ustroń, Pollando, 48-jara oficistino, deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj.

Optimala Esperanto-Ortografio de A. Lienhardt. Ebligas elimini la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, kaj apliki q, w, x, y bezonatajn en sciencoj. Prezo: 9,00 gld. Libroservo de UEA (aŭ ĉe la aŭtoro: 24 ave Riedisheim, F-68100 Mulhouse, Francio).

Internacia aktuala revuo serĉas KUNLABORANTOJN en ĉiuj landoj. Bezonataj estas ĵurnalistoj, korespondantoj, sciencistoj, fakuloj el ĉiuj kampoj, novelistoj, poetoj, karikatelistoj. Se vi havas intereson, dekomence kunlabori ĉe ambicia projekto, turnu vin al: Stefan Maul (SEM-AJNO), Singerstr. 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

Ricevu liston de senkopirajtaj teĥnikaj artikoloj. Skribu al ELA, P.O. Box 17627, Ft. Worth, TX 76102, USA/Usono.

Itala samideano laboranta en Niĝerio deziras korespondi kun afrikaj gesamideanoj. Adreso: Girolamo Lucchetta, c/o Asaaka Cement Co., PMB 3276 Kano, Niĝerio.

Poŝtmarkojn kaj militistaraĵojn insigne tutmonde interŝanĝas Emil Balusek, 320 Belmont Street, Hurst, TX 76053, USA/Usono.

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj invitas interesatojn skribi, kun respondkupono, al s-ro Peter Danning, 44 Morley Road, Twickenham, Anglio TW1 2HF. Konfidenco respektota.

Mi vendas poŝtmarkojn, belgajn: 100, 130, 150, 200 specoj: respektive 100, 150, 190, 320 Bf. Eksterlandaj (samaj kvantoj): 80, 125, 160, 280 Bf. Ankaŭ kelkaj specialaj serioj (stampitaj/nestampitaj): Demandu liston! Prezoj inkluzivas sendokostojn. M. Vanden Bempt, Spaanse Burchtlaan 29/2V, B-3040 Leuven-Korbeek-Lo, Belgio.

26-jara komencanto deziras perfektigi per korespondado: V. Arulappan, Vizhapallam, Kurinjipadi P.O., 607302 Tamilnad, Hinda Unio.

UNU MONDO – UNU LINGVO – UNU MONO

Jen sloganforme la filozofio per kiu tiuj pioniroj en la mallumaj tagoj post la dua mondmilito donis animon al la jam ekzistanta asocio de Esperantistoj, UNIVERSALA LIGO.

La filozofio ankoraŭ validas, kaj la Ligo ankoraŭ ekzistas.

Per stabiligo por ĉiam de la valoro de la internacia monunuo, la Stelo, la Ligo lastatempe prenis decidan paŝon survoje al atingo de la praktika celo; ĝi nun bezonas pli vastan subtenon de uzantoj de la internacia lingvo.

Se vi emas labori por mondpaco per tutmonda unuiĝo, petu nun ekzempleron de la Statuto de la Ligo kaj aliajn detalojn, de: Universala Ligo (R), P.O. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando. (Enmeto de irpk, se eblas, estas petata).

Ĉu vi havas ion por diskonigi al ĉiuj en la Movado?

La plej simpla kaj — konsiderante ĉion — la plej malmultekosta maniero atingi tion estas anonci en nia revuo. Memoru, ke la revuon legas minimume 13 000 homoj en 86 landoj tra la tuta mondo. Vidu nian anonctarifon sur la dua kovrila paĝo.

Kvalito kostas

Grava novaĵo!

Tial ni ne povas almoze distribui nian aktualan revuon

SEMAJNO

internacia magazino sendependa

por politiko, ekonomio, kulturo

Ekde 1979 aperos internacia aktuala semajna revuo, kiun vi povas senskrupule kompari kun ĉiu bonkvalita nacia magazino.

Tamen ĝi antaŭas ĉiun nacilingvan „internacian“ revuon:

SEMAJNO

- uzas la internacian lingvon
- enhavas nur ekskluzivajn artikolojn
- ricevas siajn informojn rekte el la fontoj
- raportas aŭtentike el la tuta mondo
- estas aperta por ĉiu opinio, ĉiu leganto
- estas politike, ideologie kaj finance sendependa

Bona kvalito havas sian prezon – sed ankaŭ valoras ĝin. Konvinkiĝu mem. Tuj aĉetu numeron O de SEMAJNO per simpla pago al nia poŝt- aŭ bank-konto. En numero O de SEMAJNO vi trovos avantaĝon, kiun vi nepre eluzu: La subskripcia kampanjo de SEMAJNO daŭras ĝis meze de decembro 1978. Vi ŝparas 18,00 gmk dum la unua jaro!

SEMAJNO kostas po numero 3,00 gmk (inkluzive sendkoston).

Jarabono (50 numeroj) ordinare kostas 150,00 gmk, sed

nur 132,00 gmk ĉe subskripcio;

do vi ricevos 6 numerojn senkoste.

Mendu numeron O de SEMAJNO per pago de 3,00 gmk al unu el niaj kontoj (klare skribu vian adreson!):

bankkonto: Verlag S. Maul (SEMAJNO), Bayer. Vereinsbank Augsburg (bank-numero 720 200 70),
n-ro 812 0900 · poŝtĉekkonto: S. Maul (SEMAJNO), Augsburg, Nbg 650 92-858

Nepre ne pagu alimaniere! Internaciaj respondkuponoj estas akceptataj nur el nepagipovaj landoj (sendu 4 respondkuponojn).

Grupoj, atentu: Se vi mendas pli ol 5 ekzemplerojn de numero O, vi ĝuas rabaton de 10 %!

SEMAJNO, S. Maul, Singerstr. 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio.